

Monda Prismo



Rolf Nesch: Tri muzikantoj (metalgrafiko)

2
1962

TRA NIA PRISMO

Z. Takač (Zagreb)

MEDITADO ĈE "FRAM"

Zeljko Takač estas jugoslava ĵurnalisto, verkisto (n. 1927), kiu pasigis kelkajn jarojn en Norvegujo. La suba artikolo estas parto de iama artikolo, al kiu ni aldonis fine niajn konkludojn.

Estas multe, je kio plenrajte povas norvegoj fieri, sed tion certe meritas la ŝipo kun la nomo "Fram". En la malnova norvega lingvo tio signifas "antaŭen", kaj vere kvazaŭ la profundan valoron de tiu ĉi ĝi ensorbis en siajn ankrojn, velaron kaj ferdekon.

"Fram" estas lokita en domon en Oslo, jes la ŝipo en domo kun aparta triangula tegmento. Tiu ĉi, kun mo-

numenta admiro pensiita ŝipo povus rakonti multe pri glacimontoj kaj minacoj de akraj, malamikaj glacirifoj. Ĝia biografio estas longa kaj eble ĝi estas la sola ŝipo, kiu estis plej proksima al ambaŭ frostumbiliko de la tero.

La ŝipo, kies longo estas nur 31,5 m, de 1910 laŭ la deziro de Amundsen krom la velojn, posedis ankaŭ benzinmotoron (anstataŭ la originala benzinmotoro). Ĝi estis destinita por polusaj vojaĝoj kaj explorekspedicioj. La ŝipo kuŝas kvieta, ŝipo sur la tero...

Sed despli viglas ĉirkaŭe laŭ la muzeomuroj la tereno de la tri balustrad-

*Laŭ marĉo kaj kamp' tangas "Lotos" poeta sur via lini'.
La pord' malfermiĝas, aperas vi, blankas la haroj,
sed juna vi restas, eĉ spite al verko kaj jaroj.
Spirit' via same potencas, kaj varmo de via korflam'
samkiel brakforto laŭ fam'.
Nu kontraŭ vi ardas tutlande de l' homoj la danko kaj am'.*

*Ĉie sonas lia voĉo
super nia gent'.
Li lukttorĉojn ekbruligis,
multajn ĝojojn li estigis;
se li mutos, jen silent'.*

*Interpretis la mizeron,
ĝojon kun amsent'.
Lia brak' kampanjojn puŝis,
lia vorto korojn tuŝis.
Se li mutos, jen silent'.*

*Iun tagon muto regos
en laŭborda vent'.
Mont' aŭskultos kaj atendos —
Sen respond', la land' silentos.
Se li mutos, jen silent'.*

galerioj kun bildoj, fotografiaĵoj, portretoj, geografiaj mapoj, kompasoj, diverskoloraj buoj, boatbumoj, elkajutaj hamakoj, foko kaj ursofeloj, kun rosmaraj dentegoj, multbrakaj graploj ankrolevaj kapstanoj, logoj por mezuri la ŝiprapidecon, skioj, neĝaj marŝoŝuoj, sledoj, eskimaj kajakoj kun pagajoj varfo, la kanoto de Amundsen, diversdikaj lineoj por la sondado ktp. ktp.


Mi estis en la interno de la ŝipo, kie ŝvebas laodoro de naftalino, mi preteriris la kajutojn de Amundsen, Nansen kaj Svaerdrupp, kiuj estis la ĉefaj gvidantoj de la legendaj ekspedicioj norde kaj sude. Dum tempo mi povis rigardi la modestan internon de la kajuto kaj miri, kiel tiu ĉi malvasta ejo sufiĉis dum tiom da tempo por la tre altstatura Nansen. Mi preteriras ankaŭ la pordon, mi vidas la malnovan menuokarton de iu malnova jar-

fina festo, kiun la kuraĝaj esploristoj pasigis sur la vasta, malvarma, oceano, dum ekstere regis frosto kaj la daŭra prujneco dikigis kaj blankigis la tutan eksteron de la ŝipo. Mi kvazaŭ vidas antaŭ mi la antikvagordan bildon kaj imagas aŭdi la duonlaŭtajn melodiojn de Grieg, kiujn lerte kaj sentoplene logas el la piano, la lertaj fingroj de Fridtjof Nansen.

Jes ja Nansen. Mi pensas pri la granda norvego, kiu estis jam en sia 21-a jaro muzeestro en Bergen kaj 6 jarojn poste jam akompanate de du Eskimaj indiĝenoj, kaj parte helpita per la sledoj tiritaj per hundoj, li transiras la preskaŭ nekonatan gigantan insulon Groenlando dum 42 tagoj. Dum sia dua esplorvojaĝo li forlasis la ŝipon kaj provis sammaniere (tiam li kromhavis la eskiman kajakon) atingi la Nordan Poluson sed ĉe la longitudo de 0 gr. kaj 15 min. malebligis lian pluiron la — malglaciiginta marakvo. Tio estis (tiutempe) la plej norda punkto kiun la homo atingis.

Kiel politikisto li estis arda pleddanto por la norvega memstareco kaj libereco, la unua norvega ambasadoro en Londono. Nansen estis konata pro sia oferema laboro por solvo de la rifuĝinta problemo, kaj al ĉiuj estas hodiaŭ konata la "Nansen-pasporto" kiun dum la jaro 1933 rekonis 52 landoj. Pro tiu sia granda porhoma laboro li estas unu el la plenrajtaj Nobel-premiitoj por la Paco. Sciencisto, politikisto, esploristo kaj kuraĝa posteulo de Vikingoj, kaj homo en sia plejinterno, tio kaj tia estis Fridtjof Nansen kiu gvidis la unuan explorekspedicion per Fram al la regionoj ĉe la Norda Poluso. La unua Fram ekspedicio daŭris iom pli ol tri jaroj (1893-96).

Dum la sekvaj 4 jaroj la aventurriĉa ŝipo estis la sidejo de oceanogra-




Roald Amundsen

foj, kartografoj kaj diversaj aliaj sciencistoj kiuj krozante per ĝi esploris la marregionojn nordokcidenten de la "verda insulo"—ĉiam per glacio kovrita — Groenlando.

Post pedanta kaj detala riparo Roald Amundsen uzas ĝin por klopodi atingi la Sudan poluson, kaj li sukcesas. Roald Amundsen estas certe unu el la tre maloftaj sciencistoj pri kies mortoloko kaj mortodato oni nenion precizan scias, kvankam lastatempe aŭdiĝas iaj ankoraŭ-neprovitaj asertoj.

Kun la Norda Poluso li renkontiĝis dufoje, la unuan fojon kiam li per la ŝipo Gja, en la jaro 1906 ŝipatingis ĝin, kaj la duan fojon li transflugis ĝin per la aeroplano "Norge" (la 12an de Majo 1926).

Amundsen iĝis martiro de la altruismo. Kiam li en la jaro 1928 aŭdis pri la malapero de la itala esplor-ekspedicio kiun gvidis Nobile, li tuj entreprenis per la hidroplano "Latham" savekspedicion, kaj la 18an de Junio li forflugis el la norvega haveno Tromsø, kvankam multaj liaj amikoj kaj fakuloj avertis lin ke tio estas vana provo, ĉar la hidroplano tute ne taŭgas por tiaspeca riskople-



Oslo: La "Fram" muzeo

Peter R. Holm

Antaŭ fulmotondro

Juna poeto el la nova generacio.

*La maro ŝvelas softe sub la
lum-uragano,
nur la surfo nudigas la
dentojn
survoje al aĝa strando,
kie ŝtonoj ripozas en senpeka
trankvilo.*

*Sed senĉese floroj premas sin
preter la lumo; subite elfaldas
sin branĉoj de l' arboj.
Klifoj blankas ostpale,
makulitaj de l' pest-nigra
sekvantaro de nuboj...*

Sekvas nigra vent-skuo.

Ombroj akras.

*La unua mordo de l' fulmo
fendas la ĉielon.*

El la norvega tradukis
Henry Fridén

na vojaĝo. Sed li tute neglektis la faktojn, — kaj de tiam ne plu revenis.

Fiera ŝipo, simbolo de la nobla progreso, al kies kariero ligiĝas inter aliaj la memoro de du noblaj viroj: Unu el ili reprezentas la entrepreneman sciencon, libervolon kaj humanisman plej ĝeneralan, la alia la kuragiĝon, aŭtoritaton kaj altruismon, al kiu li devis oferi la vivon. Super tiuj simboloj estas la ventoj de la vasta, libera oceano. Ĉu ne belaj simboloj de la norvegaj tradicioj?



La princino, kiun neniu povis vortligi

Peter Christian Asbjørnsen (1812—1885), arbaristo, naturosploristo. Eminenta kolektanto de norvegaj fabeloj. Li kunlaboris kun episkopo Jørgen Moe (1813—1882), poste kun ties filo Molkte Moe, kiu estis folkloristo kaj profesoro pri norvega popola lingvo.

Iam estis reĝo. Li havis filinon, kiu tiel turnis kaj tordis la vortojn, ke neniu povis ŝin vortligi, kaj tial li proklamis, ke tiu, kiu tion povas, havu la princinon kaj la duonan reĝlandon aldone.

Sendube abundis tiuj, kiuj volis provi; ĉar ne ĉiutage okazas, ke oni povas havi reĝfilinon kaj duonan reĝlandon donace. Eĉ momenton ne haltis la barilpordo de la reĝa bieno; oni venis are kaj amase el oriento kaj okcidento, rajde kaj ire. Sed neniu povis vortligi la princinon. Fine la reĝo konigis, ke tiuj, kiuj provas, sed ne povas, estu brulstampitaj je ambaŭ oreloj per lia granda brulfero — li ne volas plu toleri tiun senutilan kuradon en sia bieno.

Ankaŭ tri fratoj aŭdis pri la princino, kaj ĉar ili vivis sufiĉe mizere hejme, ili volis eliri por provi la feliĉon kaj vidi, ĉu ili povas gajni la reĝidinon kaj la duonan regnon. Ili estis sufiĉe bonaj amikoj kaj interkonsentis iri kune al la reĝbienon.

Irinte parton de la vojo, Cindrulo trovis mortan pigidon.

”Mi trovis, mi trovis!” kriis li.

”Kion vi trovis?” demandis la frat-oj.

”Mi trovis mortan pigidon”, li diris.

”Fi do, ĵetu ĝin! Kion vi volas per ĝi?” diris la du fratoj, ĉiam kredantaj, ke ili estas la pli saĝaj.

”Mi ne povas pro ĝi morti, mi malmulton havas porti, do mi certe portas ĝin!” diris Cindrulo.

Kiam ili iris ankoraŭ vojpecon, Cindrulo trovis malnovan barelringon; tiun li prenis.

”Mi trovis, mi trovis!” kriis li.

”Kion vi nun trovis” diris la frat-oj.

”Mi trovis barelringon”, li respondis.

”Ba! Kiun utilon vi havas de ĝi? Ĵetu ĝin!” ili diris.

”Mi ne povas pro ĝi morti, mi malmulton havas porti, do mi certe portas ĝin!” diris Cindrulo.

”Irinte ankoraŭ iom, li trovis potrompaĵon; ankaŭ tiun li prenis.

”Knaboj, mi trovis, mi trovis!” diris li.

”Nu, kion vi nun trovis?” demandis la fratoj.

”Potrompaĵon”, li diris.

”Fi do! Ĉu valoras tion havi? Ĵetu ĝin!” ili diris.

”Mi ne povas pro ĝi morti, mi malmulton havas porti, do mi certe portas ĝin!” respondis Cindrulo.

Kiam ili venis ankoraŭ pluen, li trovis torditan kaprokornon, kaj tuj poste li trovis similan.

”Mi trovis, mi trovis, knaboj!” li kriis.

”Kion nun vi trovis?” diris la aliaj.

”Du kaprokornojn”, respondis Cindrulo.

”Fi, ĵetu ilin! Por kio tiuj utilu!” ili diris.

”Ne, mi ne povas pro ili morti, malmulton havas mi por porti, do mi certe portas ilin!” diris Cindrulo.

Post iom da tempo li trovis kojnon.
"Ne, knaboj, mi trovis, mi trovis!"
li kriis.

"Vi kaj via senĉesa trovado! Kion nun ree vi trovis?" diris la du pliaĝaj.

"Mi trovis kojnon", li respondis.

"Ho, ĵetu ĝin! Por kio ĝi estu?" ili diris.

"Mi ne povas pro ĝi morti, mi malmulton havas porti, do mi certe portas ĝin!" diris Cindrulo.

Kiam ili transpasas la kampojn de la reĝbieno — kie oni ĵus sternas la sterkon — li kliniĝis, levante eluzitan plandumon.

"Ne, ne, knaboj, mi trovis, mi trovis!" li diris.

"Se vi nur trovus iom da prudento, antaŭ ol vi alvenos!" diris la du.

"Kion nun denove vi trovis, do?"

"Eluzitan plandumon", li respondis.

"Fi, do! Ĉu tio estas io por kunpreni?! Ĵetu ĝin! Por kio vi uzu ĝin?" diris la fratoj.

"Ho, mi ne povas pro ĝi morti, malmulton havas mi por porti, mi certe devas kunporti tiun, ke mi gajnu la princinon kaj la duonan regnon", diris Cindrulo.

"Jes, ĝuste vi ja aspektas kapabla tion fari, ĉu ne?" diris la du fratoj.

Poste ili eniris al la reĝidino. Unue la plej aĝa.

"Bonan tagon!" li diris.

"Bonan tagon al vi", ŝi respondis kaj turnis sin.

"Estas terure varme ĉi tie", li diris.

"Estas pli varme en la ardujo", respondis la princino; tie atende kuŝis la brulfero. Vidante tion, li tuj konfuziĝis, kaj perdita li estis.

Ne pli bone okazis pri la meza.

"Bonan tagon", diris li.

"Bonan tagon al vi!" ŝi diris kaj tordis sin.

"Terure varmege ĉi tie", li diris.

"Pli varmege estas en la ardujo", ŝi repondis. Kaj tuj li perdis voĉon kaj vortojn, — kaj ree la fero alpor-tiĝis.

Laste venis Cindrulo.

"Bonan tagon", li diris.

"Bonan tagon al vi", ŝi respondis, kaj turnis kaj tordis sin.

"Tre varme ĉi tie", diris Cindrulo.

"Pli varme estas en la ardujo", ŝi respondis; ŝi ne fariĝis pli afabla, kiam venis la tria.

"Sekve estas ebleco friti mian pigon tie, ĉu ne?" li demandis.

"Mi timas, ke ĝi krevos", diris la reĝidino.

"Ho, tio ne estas problemo, mi ĉirkaŭvindos per ĉi barelringo, respondis la knabo.

"Ĝi estos tro vasta", ŝi diris.

"Mi enbatos kojnon", diris la knabo, kaj elprenis kojnon.

"La graso fluos de ĝi", diris la reĝidino.

"Mi subtenos ĉi tiun", respondis la knabo, montrante la potrompaĵon.

"Viaj vortoj estas tiel torditaj", diris la princino.

"Ne, ne *ili* estas torditaj, sed tiu ĉi estas tordita", respondis la knabo kaj elprenis unu el la kaprokornoj.

"Neniam mi vidis similan!" kriis la princino.

"Jen vi vidas similan!" diris la knabo kaj elprenis la alian.

"Mi kredas, ke vi estas elirinta por vortligi min?" ŝi diris.

"Ne *mi* estas elirinta, sed tiu ĉi estas "elirinta", respondis la knabo kaj elprenis la plandumon.

Per tio la princino estis vortligita.

"Nun vi estas mia", diris Cindrulo, kaj jen li ricevis ŝin kaj la duonan regnon aldone.

Tradukis el la norvega

Henry Fridén, Halden

LA MONO

A. Garborg (1851—1924) verkis en nov-norvega lingvo. Moralisto kun humuro kaj ironio. Romanverkisto ("Viroj" el 1886). Novelisto kaj poeto. Tradukis la "Odiseadon".

Oni diras, ke por mono oni povas havigi ĉion.

Ne, tion oni ne povas.

Oni povas aĉeti manĝaĵon, sed ne apetiton; medicinojn, sed ne sanon; molajn litojn, sed ne dormon; klerecon, sed ne saĝon; luksajn vestojn, sed ne belecon; gloron, sed ne hejmecon; amuzon, sed ne ĝojon; kamaradojn, sed ne amikecon; servistojn, sed ne fidelon; grizajn harojn, sed ne honoron; trankvilajn tagojn, sed ne pacon.

La ŝelon de ĉio oni povas havigi por mono. Sed ne la kernon; tiu ne estas aĉetebla por mono.

El la norvega tradukis
Henry Fridén

Olaf Bull (1883-1933)

LA DRIADO

Filo de Jacob Breda Bull. Forma perfek-teco, filozofieco karakterizas la poeton.

*El arboverda nesto
driado en junaĝ', —
kaj ŝia juni-vesto
subtila foliaĵ'!*

*Kaj jen somerkostumo:
konvalo kaj violo
en kapa amindumo
desegne sur la tolo!*

*Mi mem, el la amikoj,
sopiris kun skrupuloj
al brakoj sub manikoj
kaj ĉastaj mamkupoj!*

LA LUMO

Kuracisto kaj verkisto (en la novnor-vega).

*Pro sonĝo ŝvito miajn harojn gluis,
kaj ĉio estis nigra noktinkub'.
La vivon kaj kastelon tutĝis rub'
nun pluvo kaj lavango malkonstruis.*

*Pri helpo time kriis mi kaj bruis; —
sed ĉio malaperis kiel nub'.
Vekiĝis mi — jen materiĝ' sen dub',
la lumo en torentoj larĝaj fluis.*

*Ho, estis tago! Mi estis sonĝe sub
krepuskaj ombroj keĵ nebul' premita,
foriĝis ĝi pro suneklum' tra nub'.*

*Jes lumo! Estis vi por mi helpant',
konsolon donas al homid' vundita,
min vekas al kuraĝa matenkant'.*

Tradukis Nils Utne

*Sed roborandan tuŝon
kuraĝis mi neniam,
malfermis tamen buŝon
kaj al ŝi diris iam:*

*"La bluokula juno
per kiu vi alridas,
parenca al la luno —
ĝin oni ne avidas!
Por vira man' malpia
vi troe ja serenas.
Jen ag' sakrilegia,
se revon mi katenas!"*

*Ekridis la driado,
respondis mildatone:*

*"Vi pensas belan penson —
ja tute ne malbone!
Al tiu, kiu honte
per lumbabil' molestas,
mi restos rev' volonte,
rev', kiu mi ne estas!"*

Trad.: Johan Hammond Rosbach

MAREN EN KAJAKO

El "Sur skioj trans Groenlandon" kaj "Eskima vivo" de Fridtjof Nansen.

Kajak-kaptado havas multajn danĝerojn. Patro pereis sur la maro, ofte ankaŭ fratoj kaj amikoj, sed tamen la eskimo iras ĉiutage trankvile al sia laboro, en ŝtormo kiel en kvieto. Se estas tro ŝtormplene, li eble ne eliras; sperto montris al li, ke en tia vetero multaj pereas. Sed se li jam estas surmare, li laboras, kvazaŭ la tuto estus por li la plej sensignifa afero de la mondo.

Tiu ĉi de-kajaka kaptado estas unika sporto, ĝi estas kvazaŭ luda danco kun maro kaj morto. Vidi kiamaniere la kajakisto sin ĵetas kontraŭ la grandegaj marondoj, kiuj tute superlavangas lin, pli ĝloran vidon oni ne povas imagi al si. Aŭ kiam ilin atakas la ŝtormo tie ekstere kaj ili devas provi atingi la teron — kvazaŭ nigraj ŝtormbirdoj ili venas muĝante antaŭ vetero kaj maro, kiuj tondras post ili; la pagajoj kirliĝas tra akvo kaj aero, la korpo iom antaŭen, la kapo ofte turnita duone posten por observi la ondojn: ĉio estas viglo kaj kuraĝo — kaj ĉirkaŭe la maro, kiel unusola fumanta ondrompaĵo. Kaj tiam subite dum la plej sovaĝa ludo aperas foko antaŭe. Fulmrapide la harpuno estas kaptita kaj flugas celcerte tra la marŝaŭmo; la foko fornaĝas kun la veziko, sed baldaŭ ĝi estas atingita kaj mortigita, la veturo iras pluen kun la veziko trene; kaj ĉio kun la sama supera lerteco kaj la sama trankvila vizaĝo, sen pripenso, ke ĉi tie fariĝas grandfaro.

Ĉi tie li estas granda. En ĉi tiuj

ĉirkaŭaĵoj ni fariĝas tre malgrandaj. Ni sekvu la eskimon dum unutaga kaptado.

Multajn horojn antaŭ mateniĝo li staras observante sur la monto ĉe la loĝloko kaj rigardas sur la maron, ĉu estos favora vetero. Se li certas pri tio, li malrapide iras malsupren al la domo kaj elprenas la kajak-pelton. Lia frumanĝo estis en la bonaj malnovaj tempoj trinko da akvo; nun kiam la eŭropa moleco atingis ankaŭ lin, ordinare estas unu-du tasoj da forta kafo. Matene li ne manĝas; li asertas, ke tio faras lin malkomforta en la kajako, kaj ke oni sen tio pli bone eltenas; li ankaŭ ne kunprenas ion por manĝi, nur tabakon por maĉi.

Kiam la kajako estas portita al la strando kaj la kaptiloj aranĝitaj, li rampas en la kajaktruon, fiksas la supertutan pelton (tuvilik) ĉirkaŭ la ringo kaj ekiras maren. El la aliaj domoj de la loko multaj almariĝas samtempe. Hodiaŭ temas pri ĉaso al krestfokoj (cistophora cristata, Klapmütze, hooded seal, hoodcap), kaj la kaptejo estas la malprofundoj du mejlojn ekstere en la vasta maro.

Estas kvieta vetero, la marsurfaco ruliĝas brila kun longaj ŝveloj internen al la insuletoj, malpeza nebulo ankoraŭ kuŝas super la sundoj, tra kiuj ili remas, kaj la marbirdoj, kiuj naĝas sur la akvospegulo, ŝajnas double pli grandaj. La kajakoj tranĉas trankvile plaŭdante antaŭen flanke-ĉe-flanke, la pagajoj iras regule, dum la viroj interparolas, foje interrompante per gaja ridado. La birdosagoj estas ĵetataj lude, jen de unu, jen de alia; estas por ekzerci okulon kaj brakon. Falko venas je pafdistanco por unu el ili, la sago

flugas tra la aero, kaj la traborita birdo flugilas kaj provas subakviĝi, sed estas tuj alte levata sur la sag-pinto; nun li deŝiras ĝin, rompas la kolon ĉe la beko kun forta ekskuo per la dentoj, kaj metas ĝin mal-antaŭe sur la kajakon.

Ili baldaŭ forlasas la sundojn kaj ŝerojn, kaj iras rekte al la vasta maro. Post kelkhora remado ili fine atingas la kaptejon. Grandaj fokokapoj vidiĝas super la akvo en diversaj direktoj, kaj la kaptistoj disiĝas, serĉante kaptaĵon.

Boas, unu el la plej lertaj kaptistoj de la regiono, ekvidis grandan virkrestfokon longe for kaj remis post ĝi; sed ĝi mergis sin, li kuŝas atendante, ke ĝi ree elakviĝu. Jen! Iom antaŭe ĝia malhela, ronda kapo aperas. Li klinas sin al la kajako, per senbruaĵ, sinzorgaj rempuŝoj irigante ĝin antaŭen al la foko, kiu trankvile kaj senzorge kuŝas streĉante la kapon, kaj balanciĝante supren- malsupren sur la ondoj. Sed subite ĝi ekatentas, ĝi ekvidis la moviĝantan pagaj-tabulon, kaj nun rigide rigardas lin per

siaj grandaj, rondaj okuloj. Li subite ĉesas remi, kuŝante senmove, dum la kajako pluiras per si mem, tranĉante senbrue antaŭen. La foko ne malkovras ion novan suspektindan kaj reiĝas al sia antaŭa trankvilo. La kapon ĝi ĵetas posten, kun la nazo rekte supren, ĝi banas sin en la mate-na suno, kiu brilas en ĝia malhela, malseka felo. Dume la kajako rapide proksimiĝas; ĉiufoje kiam la foko rigardas en tiu direkto, Boas senmoviĝas, ne streĉante eĉ muskolan; sed tuj kiam ĝi ree forturnas la kapon, li flugas antaŭen kiel sago. Li proksimiĝas ĝis trafdistanco, pretigas la harpunon, esploras ĉu la rimeno sur la kajakseĝo kuŝas en ordo, ankoraŭ unu puŝo kaj tempo estas — tiam la foko trankvile malaperas sub la akvon. Ĝi ne estis timigita kaj sekve volas reaperi ie en la proksimo. Tial li restas por atendi. Sed daŭras longe; povas resti sube nekredible longe tia foko, kaj eĉ pli longe daŭros por tiu, kiu atendas pri sia predo. Sed eskimo havas admirindan paciencon; escepte de la kapo, kiun li turnas ĉiuflanken



Sheroapik (groenlanda artisto): Casisto rampas al la kaptaĵo

por esplori, li kuŝas tute senmova. Fine la fokokapo ekaperas denove super la akvo iom pli fore. Li turnas la kajakon tiel singarde, ke la foko nenion rimarkas, kaj nun li ree flugas trans la akvospegulon kontraŭ ĝi. Sed subite ĝi ekatentas, rigardas lin akre dum momento kaj submergiĝas. Sed li konas ĝiajn kutimojn, kaj kun plena rapido li sagas kontraŭ la loko, kie ĝi malaperis. Ankaŭ ne daŭras multajn sekundojn ĝis ĝi ree suprenigas sian kapon por rigardi. Nun li estas je pafdistanco, preninte la harpunon; li kondukas ĝin posten, jen forta ekmovo, kaj kiel ĵetita el ŝtalarisorto ĝi flugas susure de la ĵetilo, kun la rimeno kirkle post si. La foko faras furiozan ekskuon, sed en la sama momento en kiu ĝi suprenigas la dorson por malaperi, la harpuno pikiĝas en ĝian flankon kaj ensinkas ĝis la tenilo. Kelkaj teruraj batoj de la postkorpo vipas la akvon al ŝaŭmo, kaj ĝi estas for, tenante la harpunrimenon kun si en la profundon. Dume Boas prenis la ĵetilon inter la dentoj, kaj fulmrapide li elĵetas la kapt-vezikon el la kajako post si; la veziko dancas laŭ la akva surfaco, kelkfoje minacas subakviĝo — kio baldaŭ okazas. Sed ne daŭras longe ĝis ĝi ree aperas, kaj nun li sekvas post ĝi tiel rapide, kiel la pagajo povas peli antaŭen la kanoton; dumvoje Boas kaptas la harpun-tenilon, kiu suprenflosis de la foko. La lanco pretiĝas por ĵeto. En proksima momento la krest-foko reaperas; ĝi furiozas, ĉar ĝi ne povas liberiĝi, kaj turnas sin kontraŭ sia persekutanto, unue ĵetante sin kontraŭ la vezikon, kiun ĝi ŝiras kaj tiras, kaj poste ĝi rekte atakas la kajakon. Boas estas ree je pafdistanco, la besto kurbigas sian dorson kaj pafas sin kun vaste malfermita faŭko antaŭen, tiel ke la akvo ĉirkaŭŝaŭmas. Miŝeto nun povas

kosti la vivon, sed li levas trankvile la lancon kaj enpelas ĝin per forta ekĵeto tra la buŝo kaj eksteren tra la nuko. La besto faras ekskuon, la kapo sinkas, sed en la sama momento ĝi levas sin vertikale en la akvo, la sangofluo torentas el la buŝo, ĝi sovaĝe faŭkas kaj eligas subpremitan muĝon, dum la saketo super la nazo disŝvelas. La krest-foko skuas la kapon tiel forte, ke la lanctenilo tremas kaj ĵetiĝas tien-reen, sed ĝi ne povas ĝin rompi aŭ deĵeti de si. En sekva momento Boas enpuŝas alian lancon post unu antaŭ-naĝilon tra pulmo kaj koro, la foko kolapsas — la batalo finiĝis. Li remas proksime, kaj ĉar ĝi ankoraŭ moviĝas, ĝi ricevas pikon de la longtenila tranĉilo. Poste li trankvile komencas eltiri siajn lancojn, metante ilin sur la kajakon, elprenas la tren-rimenon kaj la trenvezikon kaj fiksas ilin al la foko, kiam la veziko estas pufblovita; la harpunan pinton li elŝiras kaj ree fiksas sur la kajakseĝon, la kaptvezikon li metas en sian ĝustan lokon post si. Per la rimeno destinita por tio li kunlačas la antaŭnaĝilojn de la foko tiamaniere, ke ili alfiksiĝas al la korpo, kaj per la tren-rimeno la besto ligiĝas laŭ la flanko de la kajako tiel, ke estu facile ĝin treni: la kapo fiksiĝas al la antaŭa rimenparo sur la ferdeko kaj la postkorpo al la malantaŭa post la viro. Nun Boas estas preta por nova kapto. Li estas feliĉa kaj ne remas longe, ĝis li ekvidas alian krest-fokon. En momento li liberigas sin de sia unua kaptaĵo, kiu nun estas flosigata sur la akvosurfaco per la tren-veziko, dum li ekremas por nova kaptado. Post kelktempa ĉaso kaj streĉa atendado li kaptas ankaŭ tiun ĉi krestfokon, prenas ĝin en treno kaj returniĝas al la unua.

Daŭrigota
Trad. *Henry Fridén*

ESPERANTO

Alf Proysen apartenas al la kultantoj de la gaja muzo, kantisto, kanzonverkisto, sed ankaŭ novelisto, eĉ romanverkisto. — El lia novelaro ni prenis la jenan skizeton, kiu en sia nekomplika maniero trafas la celitan homan vanton kaj heziton. Ke en la faktoj pri Esp. estas en la noveleto malgravaj neadekvataĵoj, tio ne povas ĝeni, en si mem ĝi estas trafa.

Estis iam knabo, kiu ja estis tiel ege brava. Finlerninte la elementan lernejon li devis perlabori, sed ĉiuj diris, ke estis honte kaj kulpe, ke li ne povis plu studi.

“Vidu nur” pensis la knabo kaj ekstudis per korespondo.

Sed nun estis tiel pri ĉi tiu knabo, ke li ne volis lerni lingvon kaj historion kiel ordinaraĵoj. Li volis esti iu tute speciale aparta.

Kaj li mendis kurson en Esperanto.

Oni ridaĉis kompreneble, kiam oni aŭdis pri tio.

“Kion vi faros per Esperanto?” diris la kampulo, kies porkojn li prizorgis.

“Kial vi ne lernas la anglan” diris patrino lia, ĉar ŝi volis, ke li altiĝu ĉi tie en la mondo.

“Li povus ja lerni kubkalkulon” diris lia patro, kiu estis arbhakisto.

Sed la knabo estis persista kaj daŭrigis pri sia Esperanto kaj dum iu bela tago venis insigno per la poŝto. Li tiam iĝis membro en la Esp. klubo.

“Hura” pensis la knabo kaj iris suben al la vilaĝo por viziti kinon. Ridaĉu nur, ĉiuokaze neniu havas inter vi Esperantoinsignon.

Sed kiam li venis en la kinon, do sidis tie apud li fremda viro. *Kaj la fremdulo havis Esperantoinsignon sur si.*

Nun kuntiris sin la knabo, ĉar li

ne estis precize tiel brava kiel oni diris. U-u-u, kion li aranĝis al si mem? Kiam la lumo estingiĝis kaj oni komencis la filmon, rapidmove li ŝovis la insignon en la poŝon.

Sed tion li ne estus devinta fari. Pro tio li pentis dum multaj jaroj.

Ĉar kiam la lumo reaperis kaj li rerigardis la fremdan viron — nu, ankaŭ li faris same!

El la norvega: *F. Szilágyi*

Fil. mag. Vilho Setälä 70-jara!

La 4/4, 1962 mag. Setälä, atlasa forto de nia movado atingis sian 70-an naskiĝtagon. Jam kiel 14-jara junulo li iĝis E-isto, antaŭ la unua mondmilito jam fondinto de Studenta E. Societo, redaktoro de “Finna E-isto” kaj post la milito tiu de “Esperanta Finnlando, aŭtoro de la populara “E-a Legolibro’ kaj vortaroj, ĉefa motoro de la neforgesebla kongreso en Helsinko (1922). Akademiĉano de 1930.

Post la dua mondmilito i. a.: Redaktado de multlingva frazaro por la olimpiado en Helsinko; nova tre bela lernolibro (Privilegia Vojo), kunredaktado de Norda Prismo kaj grava iniciato: “Fondumo E. Helsinko kaj amaso da klasikaj prelegoj. Menciinde bela traduko: Erkkö: “Spegulo Homarana”.

La jubileanto havas ĉiujn siajn animajn, korpajn kaj spiritajn fortojn kaj por la bono de nia movado ni esperu kaj deziru plurjardekajn jubileojn inter similaj cirkonstancoj.

GRAFIKA ARTO EN NORVEGUJO

Artikolo por la "Norda Prismo".

Oni ornamas la murojn en Norvegujo ĝenerale per bildoj. Nuda muro en iu hejmo estas maloftaĵo. Oni enkadrigas kaj pendigas bildojn diversspecajn: pentraĵojn, fotojn, reproduktaĵojn kaj grafikaĵojn kaj — se ni troviĝas io pli bona — oni eltondas bildojn el la semajnaj gazetoj.

La honora loko apartenas al la olepentaĵoj. Tio estas Arto kun granda A. Ĉiu familio revas pri akiro de unu aŭ pluraj bonaj pentraĵoj. Ne nur pro la arta plezuro, sed ĉar tio donas pli altan socian prestiĝon. Sed bonaj pentraĵoj estas malmultaj kaj altkostaj. Oni ĝenerale devas kontentiĝi per

malkaraj amatoraj pentraĵoj, kiuj dum la lastaj jaroj ekhavis potencon konkuranton en la reproduktaĵoj, kiuj konstante pliboniĝas kaj ne estas tiel multekostaj, ke oni ĝenerale ne povus aĉeti ilin.

Dum la postmilitaj jaroj ankaŭ la grafiko trovis siajn ŝancojn en la konkurenco por loko sur la muroj. Tre multe da artistoj transiris al la kolorgrafiko kaj grandaj formatoj. Nigran-blankan grafikon en malgranda formato oni ne volas havi sur la muroj. La bildoj estu grandaj kaj kolorriĉaj, kaj la granda populareco de la olepentrado estas rekonebla en la konstato, ke tiu grafiko estas plej populara, kiu plej similas la pentroarton.



Edvard Munch: Melankolio (kŝilografio)

La ksilografio estas reliefa produkto kun tre simpla tekniko. Sur plata lignopeco eltranĉas la artisto la bildon, tiel, ke ĉio, kio havos kolorojn, restas kiel punktoj, linioj kaj surfacoj. Per cilindro la elstaraj partoj kontaktiĝas kun presfarboj, kaj poste oni povas havi detiraĵon preminte paperon al la plataĵo per presilo aŭ per mano.


Gravuraĵoj estas ne ĝusta nomo de profundpresmetodoj. Oni ĉizas la bildon sur metalplataĵon aŭ korodigas per iu acido. La pretan platon oni farbigas kaj forviŝas denove, tiel, ke nur en la profundigita parto ĝi havas farbojn. Humida papero estas metata sur la plataĵon kaj premata suben en ĉiujn fendaĵojn de la plataĵo tiel, ke la koloro transiĝas al la papero.

Litografio estas platpresado. La desegnado okazas sur poroza, plata

kalkŝtono per grasa stifto. Oni malsekigas poste la ŝtonon kaj la kolorojn oni survolvas per grasa presfarbo. Ĉar grasso kaj akvo ne unuiĝas, la farbo fiksiĝas nur al la sekaj lokoj, kiujn la artisto uzis por desegni. Kiam la paperon oni premas al la ŝtono, ni ricevas kontentigan spegulbildon de la desegnaĵo.

Al kolora grafiko oni kutimas po unu uzi ŝtonon aŭ plataĵon por ĉiu koloro kaj per surpreso oni povas riveli mikskolorojn. Grafika folio do estas "detiraĵo" de ŝton-, aŭ alia plataĵo, kiun la artisto elformis. Multe da detiraĵoj estas fareblaj, kaj ĉiu unuopa tia povas esti konsiderata kiel originala artaĵo, kiu estas signita kaj ofte numerita de la artisto.

La lignogravuro estas la plej malnova grafika metodo. Jam ĉ. la jaro 100 p. Kr. ĉinoj vaste tiun ĉi me-



P. R. Gauguin: Strigoj

tdon, sed ĝi atingis Eŭropon nur ĉ. la fino de la XIV-a jarcento. La unua profunda gravuraĵo estas el 1446, kaj la eltrovinto de la litografio estis Alois Senefelder en 1798.

La norvega grafika arto estas iom malfrua. Ni ne konas norvegan grafikartaĵon antaŭ la tempo de ĉ. 1650, kaj vere altvaloran grafikon kreis la renoviganto de tiu ĉi arto *Edvard Munch* de la lasta jardeko de la pasinta jarcento.

Munch komencis okupi sin pri grafiko eksterlande, en Berlino kaj Parizo, kie lertaj farbpresistoj estis je la dispono de la artisto, kaj kie troviĝis ankaŭ aĉetantoj de la grafikajĵoj. Munch regis ĉiujn teknikojn de la grafiko, sed plej varme li interesiĝis pri la lignogravuro kaj litografio; Li kreis tiajn verkojn dum ĉiuj tempoj ĝis sia morto, 1944.


Munch kaj Gauguin kreis renesancon por la lignogravura tekniko. Munch anstataŭigis la kutiman manieron kaj uzis po unu plataĵon por ĉiu

farbo de la lignogravuraĵo. Li kontentiĝis ofte per unu plato, kiun li segis en plurajn partojn per segileto. Li farbis la partojn aparte, kunmetis ilin kaj presis ilin kune.

La motivaro por la grafiko de Munch estis same vasta kiel tiu por liaj pentraĵoj kaj la samaj motivoj estas retroveblaj en ambaŭ artspecoj, kiel ekz--e la "Malsana infano" kaj la "Kiso", kiun multaj konsideras kiel lian plej bonan grafikajĵon, li prezentis kiel lignogravuraĵon kaj ankaŭ kiel profundgravuron.

Nikolai Astrup kontribuis plej multe apud Munch al la evoluo de la norvega grafiko. Ankaŭ li estis aŭtodidakta de ĉi tiu teritorio, kaj kiel Munch, ankaŭ li uzis personajn eltrovaĵojn kaj artifikojn tute individuajn kaj novajn. Lia plej favorata artopeco estas la ksilografio.

La ksilografioj de Astrup rememorigas multe pri pentrado kaj inter si ili estas tre variaj, ĉar li ofte retuŝadis la jam pretajn presaĵojn. Li estis



P. R. Gauguin: Birdoj laŭ la bordo (farbksilografio)

naturamanto, kiu aperigis motivojn ofte el sia hejma regiono, Jölster, en Okcidenta Norvegujo, kie li loĝis ĝis sia morto (1928).

Ambaŭ — Munch kaj Astrup — vivis en ekstrema izoleco kun tre malgranda kontakto kun aliaj artistoj. Tio estas unu el la kaŭzoj, ke ili ne havis grandan influon al la grafiko en Norvegujo, sed Munch ricevis esencan rolon en la grafikarta evoluo en Germanujo.

De 1899 ekfunkciis klaso por grafiko en la Reĝa Desegnolernejo en Oslo. Pluraj artistoj vizitis ĝin kiel lernantoj tiam, sed manko de la publikintereso kaj la mankhavaj precirkonstancoj baris la vojon de la ekflorado de la grafiko. Eĉ la tridekaj jaroj de nia jarcento ne montras grandan interesiĝon pri tiu ĉi arta esprimrimedo. Sed en 1933, germana grafikisto *Rolf Nesch* (n. 1893) enmigris al la lando kaj lia arto donis iniciaton al la eksvingo de la grafiko. Li laboras per metalgrafiko. Anstataŭ korodigi aŭ elpiki la liniojn, li uzas ardajn metaldratojn sur la plataĵo kaj kreas rimarkindajn grafikajn foliojn, iaspecan plastikan grafikon kun specifika abstrakta beleco kaj fantazio. Rolf Nesch nuntempe havas internacian famon kaj havas gravan influon en la norvega artista vivo. De 1946 li estas norvega civitano kaj vivas en sia bieneto en Ål (legu: Ool) en Hallingdal.

Tuj antaŭ la dua mondmilito oni povis rimarki plialtiĝantan interesiĝon pri la grafiko kaj Norvegujo ricevis longan vicon de artistoj, kiuj eksperimentis per la esprimrimedoj de la grafiko. Ni nomos nur *Paul René Gauguin* (n. 1911. el la tria generacio de la duone skandinavia Gauguina familio), kiu kreis vastiĝantan interesiĝon por la farbksilografio per siaj verkoj, komencitaj en 1935.

Sed nur post 1945 ni povas vere ĝoĝi pro ekflorado de la norvega grafiko. Nuntempe ni trovas ne nur la pli aĝajn, konatajn artistojn tiuterene, sed ankaŭ multe da junaj artistoj laboras pri grafiko, precipe pri la farbilitografio.

El la norvega: *F. S.*

Solenos sian

40-jaran jubileon SLEA en Popola Domo de Limhamn dum la pentekosto de la 9-a ĝis la 11-a de junio 1962, kiam okazos la jarkunveno de la laborista organizo.

Norda Prismo sendas siajn gratulojn kaj bondezirojn!

Nova fako de grajnoj en Vento:

La nova fakrondo de GRAJNOJ EN VENTO celas daŭrigi kaj ampleksigi la klopodojn jam faritajn en tiu ĉi kampo (ekz.: "Sciencaj Studoj").

Petu informojn! Adreso: Alberto Barrocas Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo. (Laŭeble, aldonu respondkuponon).

Malsupra Austrio

kaj la centro de Erste Österreichische Sparkasse, eldonis Esp. prospektojn resp. ankaŭ kun Esp. teksto. Belaj propagandiloj, havigeblaj ĉe Landesfremdenverkehrsamt, Herrengasse 13. *Wien* (Aŭstrujo).

Daily Mail

la granda angla taglibro eldonis tre belan grandformatan *Bildlibron Pri Bestoj* kun centoj da koloraj, bonegaj ilustraĵoj kaj zorge redaktita esperanto-teksto. Samloke aperis "Amuzo per scienco". Ambaŭ libroj estas idealaj donacoj por ĉiuaĝaj infanoj ĝis 80 jaroj. Ni esperas, ke ni havos okazon baldaŭ recenzi la verkojn.

La du federacioj en Belgujo

unuigis sub la nomo Belga Esp. Federacio kaj la belaspekta komuna revuo oficiala aperas kun la simbola nomo "Sonorilo". Redaktoroj: M. Jaumotte, F. Roose kaj G. Mertens. Niajn bondezirojn al la esperiga "novulo".

LA MAJSTRO FORĜISTO

Aktoro. 1901—1931 en Nacia Teatro de Oslo. Li estis tre populara dramverkisto.

Oni ĉiam nomis lin la majstroforĝisto, kvankam li nur estis forĝisto kampara.

Kiam li estis junulo, li ekloĝis apud vojkruciĝo, ne malproksime de granda urbo.

Li estis alstatura kaj bela, kun orkoloraj haroj, hela kaj delikata haŭto — malgraŭ sia forĝista metio.

La nomon li fakte meritis, ĉar li estis majstra forĝisto. Multfoje li ekhavis ofertojn pri transloĝiĝo al la granda urbo, oni promesis al li oron kaj honoron. Sed li restis apud sia vojkruciĝo.

Iom distance de tie estis somera loĝejo de maljuna grafo. Kaj tiun someron kiam la forĝisto ekloĝis apud la vojkruciĝo, la grafo estis en sia somera loĝejo kune kun sia sola infano, dekokjara fraŭlino.

La juna nobelino fianĉiniĝis al riĉa barono. Kaj tio devus fari al ŝi grandan feliĉon, malgraŭ tio, ke la barono al kiu ŝi estis edziniĝonta, estis jam iom maljuna. —

La forĝisto estis ĉasisto. Ĉiusabate li kutimis liberigi ambaŭ helpantojn tiel frue, ke li mem havis sian ŝancon vagi kun pafilo en la grandaj arbaroj iom fore. —

Iufoje tiun someron li iris arbaren, kaj venis al arbarlago. Tie li povis esperi sukcesan ĉason, kaj estis bela loko. Flanke de la lago, situante iom pli alte, estis — kvazaŭ oni tie ilin starigis — kelkaj grandaj, belformaj ŝtonoj. En siaj pensoj li eltrovis nomon de tiuj ŝtonoj, aŭ tiu loko: la ŝtona preĝejo.

Kelkfoje li tie ripozis. Tie estis mola fundo, kun eriko kaj seka musko. Kaj tiel pace kaj trankvile. Dika piceo staris apude, etendante siajn pingloplenajn branĉojn super la "preĝejeton", kvazaŭ tegmenton.

Ankaŭ tiun vesperon li intencis tie sidiĝi por momento. Sed tiam li ekvidis cervon trans la arbarlago.

La besto blekis, eklevis la kapon kaj spiregis tra la naztruoj. Estis longa pafdistanco. Sed la forĝisto rapidis, ekcelis, kaj — maltrafis. La cervo jam forkuris kun granda rapideco — kaj kiel sago malaperis en la arbaro.

Kaj nun la forĝisto ekatentis, kial ektimis aŭ maltrankviliĝis la cervo: Rajdĉevalo, kun juna fraŭlino sur la selo, elsaltis el la arbaro, kaj preskaŭ rekte tien, kie staris la forĝisto. Verŝajne la pafisto estis ŝokinta la ĉevalon — kaj ĝi freneze forkuris.

La forĝisto forĵetis la pafilon, rapidis al la ĉevalo, eksaltis, kaj ekprenis ĝian kapon. Kaj li sukcesis haltigi ĝin, sed nur post kiam li mem estis kuntrenita longan distancon, kvazaŭ tra la libera aero.

Kaj nur nun la forĝisto rigardis ŝin, kiu sidis sur la selo, kaj li salutis ŝin per sia ĉasista ĉapo. Ŝi estis pala, kaj iomete tremis.

"Vi bezonas iom da ripozo, mi opinias," diris li. Kaj li etendis al ŝi la manojn kaj helpis ŝin elseliĝi.

"Vi estas vundita," diris ŝi. Li sentis ion varman sur unu el la vangoj, kaj ŝi proponis al li puntan poŝtukon.

"Ne!" li ridis. "Certe nur branĉeto piketis min, kaj mi povas lavi min en la lago. Sed unue mi devas zorgi pri

via ĉevalo — kaj ankaŭ pri vi.” Li kondukis ŝin al la ŝtona preĝejo: ”Jen agrabla ripozejo,” li diris.

Sed ŝi ŝajne vidis nenion — krom lin.

Poste, tiun someron, la metihelpantoj de l'majstro liberiĝis eĉ pli frue sabate — kaj eĉ en aliaj tagoj.

Sed nun li malofte mortpafis ĉasbeston, la forĝisto. Kutime li nur iris al la ŝtona preĝejo. Tie ili estis kune, ŝi kaj li. Kaj tie estis tiel paca ripozejo. —

Iuvespere — jam proksimiĝis aŭtuno — la forĝisto atendis en la ”preĝejo” ĝis mallumiĝis. Kaj li atendaĉis ĝis forpasis la nokto, kaj la unua sunradio trovis la vojon inter la preĝejetan murojn — kaj ekbrilis sur io apud unu el la muroj. Letero. Estis skribitaj nur tiuj vortoj: ”La barono alvenis — por min kunpreni — kaj mi devas forveturi — !”

— Forpasis multaj jaroj — kaj la majstroforĝisto maljuniĝis.

Ankoraŭ li estis majstroforĝisto. Faris unu fame konatan laboron post alian, dum la sekvantaj jaroj.

Sed jam de longe oni opiniis, ke li ne plu estas — kaj eble neniam estis — tute normala. Li preskaŭ ne plu parolis. Kaj la monon kiun li gajnis, li fordonis, iom post iom, por tiel diri. Kaj la plej stranga koncerne lin: Ĉiun tagon kiam estis bela vetero, kaj vesperiĝis, li ĉasvestigis sin kaj iris arbaren. Sed li neniam ĉasis, nur iris al kelkaj grandaj ŝtonoj apud tiea arbarlago. Tie li sidis kvazaŭ ion atendante — ĝis la mallumo malhelpis la rigardon. —

Iun somerdimanĉon altrangaj gastoj vizitis la forĝiston. Juna barono kaj lia filino, knabineto.

La juna barono rakontis, ke lia patrino estas mortonta. Kaj kial ŝi ĉiam deliris pri ”la majstro apud la vojkruciĝo”?

Tie ili staris, en la domo de l'forĝisto. Li ankoraŭ estis altstatura kaj svelta, kvankam la haroj estis blankaj, kaj la okuloj iom rigidaj kaj vitrecaj.

Kaj la barono kondukis, kvazaŭ instinkte, sian filineton al li. ”Bele adiaŭu la maljunan, belan viron,” li diris. ”Diru al li: adiaŭ, avo maljuna!”

Kaj la etulino faris laŭ peto de sia patro.

La forĝisto eklevis ŝin, rigardis rekte en ŝiajn okulojn, dirante: ”Jen bona eta sunradio, sinjoro barono!”

Li akompanis ilin al la veturilo. Kaj li restis starante tie, rigardante post ili, ĝis ili malaperis en polvobulo. —

Tiun vesperon li ankaŭ iris ĉasbarenen, la forĝisto, kvankam estis dimanĉo. —

La postan matenon oni trovis lin. Li sidis apud unu el la grandaj ŝtonoj proksime de la arbarlago.

Li estis atendinta tie la lastan fojon. —


Eble ŝi estis veninta, ŝi, kiun li atendis. Kaj tiel juna kaj bela kiel tiam —?

Eble ŝi estis preninta lin je la mano, por lin konduki al la arbarlago, montrante al li per la akva spegulo, ke ili ambaŭ estis egale junaj kaj belaj.

Ĉar li havis tiel feliĉan rideton je la buŝo. —

En la ŝtona preĝejo estis tiel paca ripozejo. —

Trad.: *Tr. R.*



HENRIK WERGELAND (1808–1845)

Por ĉiu norvego Henrik Wergeland estas la senlaca popoledukanto, la senkompromisa batalanto por justeco. Hodiaŭ li precipe estas la genia poeto, kiu donis al nia literaturo verajn perlojn. Multaj el liaj poemoj fariĝis kvazaŭ popolkantoj parkere lernitaj de la ordinara norvego. Ekster Skandinavio lia nomo apenaŭ estas konata, kvankam ĝi meritas konatecon precipe inter la esperantistoj, ĉar la idealisma agado de Wergeland ĉirkaŭbrakis la tutan mondon kaj tuŝis ĝuste tiujn problemojn, kiuj okupas nin esperantistojn, escepte de la lingvoproblemo mem. Liaj vortoj grandparte ŝajnas al la hodiaŭa mondo iom naivaj, kaj lia voĉo ne sonis en la mondo tiel laŭte kiel la voĉo de lia posteulo kaj spirita heredanto, Bjørnstjerne Bjørnson. Sed ne estas dubo pri tio ke lia agado efikis eduke al la norvegoj kiel mondĉivitanoj.

Wergeland estis vera filo de la franca revolucio, kaj senripoze tra sia tuta mallonga vivo li luktis por tiuj kiuj suferis pro nejusteco. Li revis pri estonta ideala mondo, en kiu regos libereco al ĉiuj nacioj kaj rasoj kaj — klasoj: Li vigle partoprenis en la liberec-batalo de Polujo per sennombraj paroladoj kaj artikoloj. Li same arde apogis la irlandanojn en ilia batalo por libereco kaj same la batalon de la hispanoj kontraŭ interna reakcio k. t. p., k. t. p.

Preskaŭ senescepte lia voĉo sendube fariĝis nur krio en la dezerto. Sed ni scias ke en unu afero lia strebado donis videblajn fruktojn, nome en la tiel nomita judo-afero: La nova norvega konstitucio (de 1814) havis unu paragrafon, kiu malpermesis al la judoj aliron al la lando. La ardo

kaj eltenemo, kiun li montris en la batalo por la rajto de la judoj, certe ne dependas de precipa amo al la judoj. Li amis ĉiujn homojn, kiuj suferis pro nejusteco, sed tiufoje temis ĉefe pri lia korinfano: la konstitucio. La norvega konstitucio estis rigardata kiel la plej libereca de la mondo, kaj al la humanisto Wergeland la paragrafo pri la judoj ŝajnis hontinda makulo.

Per ardaĵaj paroladoj kaj artikoloj li senlace batalis por forigo de la jam pli kaj pli famiĝanta paragrafo. Precipe efikaj tamen estis liaj poemoj, ĉar ili diskoniĝis inter la larĝaj popoltavoloj, kaj ilia homeco kaj ofte ankaŭ naiveco facile iris rekte en la korojn de la norvegoj kaj tiamaniere fariĝis potenca propagando.

Nur en 1839 li sukcesis prezentigi antaŭ la parlamento proponon pri ŝanĝo de la "judo-paragrafo". Intertempe — ĝis la afero estis traktata de la parlamento en 1842 — li aperigis la poemaron "La Judo, naŭ florantaj dornobranĉoj" kun dediĉo al la parlamento. Sed la propono falis. Tuj la sama propono estis denove prezentata por decido en 1845, kaj antaŭ tiu tempo Wergeland aperigis novan poemaron: "La Judino, dek unu florantaj dornobranĉoj". Li tiam estis morte malsana kaj ne ĝisvivis la sukceson de sia batalo. Nur en 1851 la parlamento ŝanĝis la paragrafon, sed tiam jam "dankemaj judoj ekster la limoj de Norvegujo" starigis sur lia tomo monumenton kun la epitafo: "Henrik Wergeland, la senlaca batalanto por rajto de la homo kaj de la civitano."

Liaj poemoj ankoraŭ konservas sian freŝecon kaj sian fortan pozicion

en la norvega poezi-literaturo. La tri sekvantaj poemoj estas elektitaj el la supre menciitaj du poemaroj. Krom pro la delikata poezieco ili ankaŭ interesis pro la variaj kordoj, sur kiuj li ludas en sia celkonscia apelaciado al la malsamaj karakteroj kaj intelektoj inter la norvegoj.

En "La armeo de la vero" li unue pesimisme esprimas dubon pri la efiko de la malestimata vorto en la batalo kontraŭ maljusteco, sed finas la poemon per la aserto ke la vortoj, se ili servas la veron, fine venkos. Tiu poemo evidente celas la idealistojn, kaj la tezo: "la ver' venkas nur en perd-sufer'" ankoraŭ havas sian validecon.

En la dua poemo, kiun mi elektis, Wergeland celas la bonkorulojn kaj la humanistojn, kiam li rakontas pri maljuna judo, kiu en kristnaska vespero estas forrifuzata en terura ŝtormo de la domo de kristanoj, kies infanon li savis kaj frostmortas kune kun ĝi en la neĝo ekster ilia domo.

En la lasta li celas la racian ekonomistojn kaj montas kiel la abeloj (t. e. la judoj) kreas riĉon kaj bonstaton ĉe tiu kiu ilin akceptas, dum tiu kiu ilin forrifuzas (la piceo, t. e. Norvegujo), suferas de stagnado kaj malriĉo. La piceo fine replikas iom negative. "Nu, tia estas mi!" Oni notu ke tiun poemon Wergeland verkis post la unua parlamenta rifuzo pri ŝanĝo de la "Judo-paragrafo".

*

La tri poemoj estas tradukitaj konservante la originalan formon, escepte de la lasta, en kiu mi ŝanĝis ĉiun duan verson de vira al ina. Mi konservis la rimon tie kie la originalo estas rimita.

*

Lit.: (por anglolingvanoj) H. W., Poem, Hodler & Stoughton Ltd., London.

H. Wergeland

La armeo de la vero

(El "La Judo")

Vortoj? Tre malestimataj?
Kaj eĉ pli,
vestite en la poezi!
Ho, senpovas vortoj bataj
en batalo
por la vero-idealo!

Tondro muĝu, fulmo brulu
antaŭ ĝi!
Helpe de l'ĉiela Di'
la anĝel-legio rulu
siajn alojn
vaste super montojn, valojn!

Ho ve, kial ne subite
venas ĝi?
kun stelarka bril-radi'
sur la kasko, plenarmite?
Glava forto
pli efikus ol la vorto.

Kial ne de tendaj miloj
brilas blank'
vaste sur la monta flank'?
Kial ne al siaj filoj
ĝi delegas
povon, kiu vivon regas?

Krutas muro de malklero.
Superstiĉ'
tronas en sekuro niĉ'.
Ĉe la templo de malvero
svarmas hordoj
garde por malnovaj ordoj.

Tamen marŝ! Linioj, lerte!
Vort-legi!
Venkon donos ja al vi
la sinjor' de lumo certe,
se sur tero
vi nur servas por la vero.

LA KRISTNASKVESPERO

(El "La Judo")

Kiu sen tremo
memorus ŝtormon de la pov-
ekstremo?
Hurlantan ĥoron,
kiu gravuras sin en la memoron?
Ĉar ĉiu pensis: estas punsendit'
pro mi a peko,
nur mi n konceras tiu tondra bleko:
ekkonis mian pekon la spirit' . . .

pri ŝtorm' skuanta
eŝ koron en fortula brust' giganta,
dum tra tumult' li aŭdas ke al li
la propra nomo
portiĝas per la ventoj de fantomo
de l' arboj tranĉas kvazaŭ korva kri'?

Sed korvo sidis
en roko, kaj la lup' malsaton bridis,
la vulpo elkaviĝi timis pli.

Marŝu, vortoj! ver-defendo!
En a v a n t!
Homaj koroj, pulsa sang'
estos via venko-tendo!
Gloro brilo
sternos liton en trankvilo.

Marŝu do, sen viziero.
Vero-vort'!
Ĉar doniĝis al vi fort'
de l' regnestro de la vero,
ke al vi ne
venu morto — laŭ-destine.

Tial brave! Nana fronto!
Ĉar la ver'
venkas nur en perd-sufer'.
Al la falsa dezert-monto!
Flugu ĝi kaj
antaŭjuĝ-nebuloj dikaj!

Trad.: E. A. Haugen

Ne lumoj brulis,
endome la katenohund' ululis . . .
En tia ŝtorm' Vin vokas preĝoj, Di'!

En tia ŝtorm' — estis kristnask-
vespero —
kiam noktigiĝis antaŭ tag-mezuro,
maljuna judo trovis sin en mezo
de vasto sveda, la Tived-arbaro.
Sopire lin atendis al la valo
de valo transa, kaŭze de Kristnasko,
knabinoj, ĉar en la tornistro kuŝis
rubandoj, bukaj, ĉiuj bezonaĵoj
por morgaŭ, dua tago kaj novjaro.
Ĝi streĉis la sopiron, sed ne time:
ĝis nun maljuna Jakob ne en unu
Kristnasko trompis: Li alvenis certe
eĉ kiel la kristnask-vespero mem.

En tia ŝtorm' . . . "Ts! ĉu nur estis
ŝtormo
hurlanta tra la arboj? Ĉu ne krio?
Jen nova krio!" Kaj maljuna Jakob
tuj haltas kaj aŭskultas duafoje.
Ne sonas plu. La ŝtormo kreskas kiel
la akvofalo tondras sur dronanton.
Li paŝas plu. "Ts! Jen denove sono!"
— kaj sono kiu tranĉas la ventmuĝon.
"La trompa strigo krias infanete.
Infano ne eliras ja en tia ŝtormo?
Eĉ lupu ne la idojn tiel traktas."
Maljuna Jakob vadas plu en neĝo.
Jen ree krio, kaj li ne plu dubas,
ĉar la ŝtorm-puŝo kiu kirloturon
el neĝo pelas super la arbaron,
kunportis vorton, solan vorton al li,
kaj tuj li turnas siajn paŝojn tien
arbaron penetrante pli profunde
kaj pli profunde en la neĝon, nokton,
kiu stariĝas kvazaŭ nigra muro
je ĉiu paŝo — kun neĝflokaj blankaj,
kvazaŭ la vasta arbarego plenus

de flugaj, vualitaj fantom-bordoj,
kiu hurlante baris lian vojon,
kivliĝis piedpinte, kreskis forte,
kaj malaperis inter nigrajn trunkojn.

Sed la maljuna luktas kun la ŝtormo.
Li iras dum ĝi kreskas. Dum ĝi haltas,
por spiri, li aŭskultas surgenue.
Sed ree tuj li iras en mallumon
kiel la gnomoj tra la nigran humon.
Ne plu li aŭdas ion. Li ektemas,
pensante ke fantomoj lin atakas,
kaj li elflustras la konatajn preĝojn.
Jen ree ĝemo! kaj nun tre proksime.
Revenas lia krio en la ŝtormon
al lia buŝo. Sed jen tie, tie!
Dek paŝojn plu! Moviĝas io nigra
surneĝe, kvazaŭ la ventego ludus
kun stumpo malfiksita ĉe l' radiko.

„Jehova! jen braketo! O Jehova!
Infano, jes, infano, sed mortinta!” —
Ho, ĉu la steloj pensis tiun nokton,
dum kiu brilis stelo Bet-Leĥema,
ke bono ne surtere plu okazos?
Ne vidis ili ke maljuna Jakob,
ĝojega, kvazaŭ trovus li trezoron,
tuj ĵetis sian riĝon: la tornistran,
deprenis sian robon kaj ĝin volvis
sur la infanon, bruste sin nudigis
kaj metis tien ĝian frostan vangon,
ĝis ĝi vekigis de kor-batoj liaj.
Jen li ekstaris. Sed nun kien? Ŝtormo
forblovis jam la spurojn, li ne zorgis,
Ĉar nun li en la muĝo de l' arbsuproj
nur aŭdis jubilharpojn de Davido;
neĝblovoj ŝajnis nun al li keruboj
montrantaj vojon sur flugiloj blankaj.
En la hazardo, kiu lin kondukis,
li vidis fingrotiron de l' sinjoro.

Sed trovi domon en la sovaĝejo
en nokto, kiam ne lumiloj brulis!
Mezvoje kuŝis nur soleca domo,
Tegmenton ne de l' neĝo li distingus
nek nigran muron de la nuda roko.
Mirakle, tamen, ĝi haltigis lin.

Li falis svene. Plu ne havis forton.
Blowadis multe, antaŭ ol li povis
sin treni ĝis la pordo kun la ŝarĝo.

Li nur frapetis, ĉar l' infano dormis.
Nur nun li ekmalhavis la tornistran,
ĉar li nenion havis por donaci
al la bonuloj, kiuj baldaŭ urĝos
malfermi al li sian pordon. Ho ve
li longe frapis, ĝis respondo sonis:
„Je l' nomo de Jesuo, kiu tie?”
„Maljuna Jakob. Ĉu vi ne min
konas?”

Maljuna judo?”

„Judo!” time kriis
virin' kaj viro. „Do ekstere restu!
Ni ja ne havas monon por aĉeto.
Vi portus malfeliĉon en la domon
en nokto Lia, kiun vi mortigis.”
„Mi?”

„Jes, popolo via. Jen la peko
punata milgeneracie.”

„Ve!
Ĉi nokton, dum enestas hundo?”

„Jes, hundo,
sed ne judaĉo en kristanan domon!”

Li ne plu aŭdis. La kruelaj vortoj
penetris lin pli forte ol la ventoj
kaj ĵetis lin pli forte en la neĝon,
fleksantan super la infan' dormonta.
Li sentis, rigardante la fenestron,
ĉu tamen reaperos la vizaĝo blanka,
kvazaŭ li malleviĝus en lanugon
ke vigla varmo fluas tra la vejnoj
kaj ke konataj estaĵetoj flustras
kiel somera vento en la herboj,
ŝvebadas ĉirkaŭ li, ĝis unu diras
kun fingrosigno: „Venu! li jam
dormas.”

En lumigitan halon ili flugas,
nur la infano restas lit-piede
senhalte almetante la kusenajn
pli bone ĉirkaŭ lian lacan korpon,
ĝis ŝajnas al li ke li endormiĝas.
— Nur kreskis neĝo ĉirkaŭ la
mortinto . . .

"Jesu! Ankoraŭ sidas jen la judo!"
la viro kriis ĉe l' marteno porde.

"Do pelu lin! Ja estas Kristnask-
tago",

l'edzino diris. "Jen, jen kiel la judaĉo
firmtenas sian pakon al la brusto!"

"Li estas ju trudema kun la varoj.

Rigide li rigardas al ni, kvazaŭ
nu havus nomon por aĉeti ion".

"Mi tamen volus vidi la tornistron."

"Do montru, judo!"

Ambaŭ jen elpaŝis.

Frostbrilis la rigardo de l' kadavro.

Paliĝis ili pli ol ĝi, timkriis

tremante pro ekpento. "Ho ve! Dio!

Ve, malfeliĉo!" Ili levis lin,

la pako sekvis, kaj malfermis robon.

Jen, ĉirkaŭ lia kolo pendis *M a n j o*

ilia propra — kiel li, kadavro.

Ne tiel rapidege fulmas, kiel

teruro kaj doloro ilin batis.

Ne blankis neĝo kiel nun la patro,

ne hurlis ŝtormo kiel la patrino.

"Ve, Dio punis nin. Ne frosta ŝtormo,

kruele n i mortigis la infanon!

Ve, kiel tiu judo nian pordon,

ni pordon al saviĝo vane frapos."

Post plugo de la vojo venis gastoj

de l' farmo kie Manjo edukiĝis,

de kie ĉe l' kristnaska sonorado

ŝi memdecide iris antaŭ-ŝtorme

por en kristnasko gastigi la gepatrojn.

Ne por l' infanon serĉi ili venis,

sed pro la judo, por la junulinoj,

kies espero gastigi la preĝejon

nun celis al novjar', se li troviĝos.

Jen li — mortlita antaŭ la fajrejo,

kie la viro kun okuloj frostaj

kaj korpo kurba kiel la kadavro,

sidadis rigardante en la fajron,

senhalte hejtigante, ke l' kadavro

rektiĝu kaj kruciĝu ĝiaj manoj.

Genuis flanke la patrin' de Manjo

fleksante ŝiajn brakojn pli kaj pli

alkroĉe al la kolo de l' kadavro.

"Ŝi ne plu estas nia", ŝi singultus,

"L' infanon li aĉetis per la morto.

Ne ni kuraĝas preni Manjon de li,

ĉar ŝi Jesuon petu pri propeto

ĉe lia Dia patro, ĉar al l' i

la povra judo plendos"

Trad.: G. A. Haugen

Rim. La menciita 3-a

poemo aperis en n-ro 3.

D-ro Marek Wajsblum (1903—1962)

La talenta, energia, estiminda redaktoro de "The Worker Esperantist", nia kunlaboranto, Marek Wajsblum (M. Arco), mortis la 19an de februaro.

La malĝoja sciigo ne venis ne-atendite. Wajsblum vivis jam de jaroj en la ombro de la morto, sed lia senĉesa, persista laboro, lia energio havis sian propran lumon, kiu forgesigis, ke li povis morti pro sia malsano en kiu ajn minuto. — Nia kulturmovado perdis gravan valoron, konscian kaj seriozan servanton. — Honoron al lia memoro!

Eŭropa ferio-semajno

okazos en Svislando (2—8.9 1962) kun varia programo en diversaj lokoj. Subtenas morale kaj konsilas al partopreno: *Le estraro de IFEF*.

Patronecas: Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. *Organiza adreso:* Hans Hunkele, poŝtfako 417, Aarau (Svislando).

Nova Esp.-prospekto pri Wuppertal

aperis en tre bela formo kun allogaj ilustraĵoj. Presse und Werbeamt, *Wuppertal*, Germanujo sendas ĝin je E-lingva deziro.

Frateco monda

(Adr. Place des Nations, Genève, Svisl.) deziras doni altmoralan edukon al la homoj. Petu la "Alvokon al la Edukistoj".

Esperanta poŝtmarko: Praga 1962

En la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio okazos 18. VIII.—2.IX. 1962. "Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj — PRAGA 1962." La ĉeĥoslovaka ministerio de trafiko kaj telekomunikado eldonis por tiu okazo serion de specialaj poŝtmarkoj kun dulingvaj tekstoj, nacilingva kaj fremdlingvaj. Sur la "unuataga koverto" eldonita 18.XII.1961. aperis inter aliaj esperantlingva poŝtmarko kun valoro de 2 Kêš (kronoj ĉeĥosl.).

Bonfaremo kal memkritiko k. c. en Skandinavio

Fragmenteto aktuala por tiu ĉi numero el la memironia humura traktato de W. Br. — dana humoristo — pri la "Nunaj vikingoj skandinaviaj". Kun la afabla permeso de la aŭtoro.

Honesteco estas alia, kvankam leĝenda karaktertraĵto de la skandinavoj. Tion scias ja la gazetvendistoj de la strato. Se li forlasas sian vendobudon, metas tien kalikon por enĵeti la monon, se oni prenas lian gazeton. Tio ja estas certe supergajna entrepreno, ĉar ankaŭ preterirantaj personoj ofte enĵetas kelkajn monerojn kredante, ke temas pri kolekto por la povraj hindaj infanoj aŭ maljunaj, senmastraj hundoj en Afganistano. Skandinavio ĝenerale estas ĉiam preta por helpo. Oni povas diri ke tagon post tago oni kolektas surstrate, de pordo al pordo, en la kontoroj kaj fabrikoj por filantropaj celoj kaj helpagadoj por subevoluintaj landoj. Se oni nenion plu povas malhavi, ĉar la partopagoj por la televidilo, aŭto, lavmaŝino kaj magnetofono malplenigas la salajran saketon, oni donacas duonlitron da sango al la "sangobanko", ĉar ne decas doni nenion.

Se oni provokas norvegon, danon aŭ svedon por memkritiko, per la difino, kia homo li estas, la rezulto povas esti sufiĉe varia. Norvego plenumas tiun ĉi taskon per plena suspekto kaj kun subtono de ĉagreniĝo li opinias, "Vi serĉas certe miajn difektojn kiel ekvilibron por la virtoj de la danoj kaj svedoj!" Post tio li kreskas kun sia tasko, ĝis li aperas kiel impone granda, rigida, nealproksimigebla granitmonto, el kiu eĉ guto da

memkritiko ne estas elpremebla, kiel ajn oni provas akceli tion. Kia li estas kiel homo? Nun, *for fanken* (je la diablo) — milda, norvega blasfemo — kompreneble centprocente sukcesinta!

Se oni instigas norvegon deklari sian opinion pri svedoj kaj danoj, li respondas komence ion similan: "Mi aŭdis, ke en Finnlando troviĝas tre agrablaj homoj." Sed se oni pludemandas lin, jene li defendas siajn skandinaviajn fratojn: "Ili ja ne estas kulpaj, ke ili ne estas norvegoj!" ...

(La sama aŭtoro diras en sia "Ni en Skandinavio":)

Pri Norvegujo ...

Norvegujo estas la dua lando laŭ grandeco en Skandinavio kaj ne senmotive oni nomas ĝin la Lando de la Meznokta Suno. Oni bezonas nur vojaĝi kelkmilojn da km-oj norden en la lando por preni sunbanon tagenokte. Norvegujo estas la malplej dense loĝata skandinava lando. Dum Danlando havas meze 94 loĝantojn je km², Norvegujo havas maks. kvaronon da loĝanto je ĉiu montego. El la lasta klarigo oni povas konkludi, ke la lando estas tre malebena. La norvegaj montoj estas tiel multnombraj, ke por havi lokon por ili ĉiuj, kelkajn oni devis meti unu sur la alian.

Trad. R. E. k. F. S.



FULMOTONDRO

El "Leteroj de Kolbotn"

Komencas vesperiĝi. Mi tamen devas eliri kaj ĉirkaŭvagi dum tempeto; mi estas deprimita kaj nerva; aero povas esti necesa. Estis mallume kaj preme la tutan tagon. Frostece; la ĉielo plena de vagantaj nuboj, kiuj kolektiĝis kaj disiĝis; blanka nebul-ĉapelo sur la monto Trona. Nun plidensiĝadas en oriento. Estas Sinaj-nigre super la montodorsoj; la nebula ĉapelo fariĝis grandega nubsako, kiu kaŝas duonon de la monto, pendas malsupren el la blunigra nubmaro, griziĝas malsupren kaj finiĝas per blanka rando, kiu distranĉas la monton je la mezo. Norde, kontraŭ Tynset, same nigriĝas. Timiga, peza karbobluo-nigro, kiu en la ŝiroj inter la nubaj tavoloj ŝanĝiĝas al verdo, bluverdo, stranga, malsana koloro, meze inter marverdo kaj botelverdo. En nordo kaj okcidento pli hele; sensanĝe griza nubtavolo, en kiu kunestas nebrilaj, flavaj tonoj.

Iam kaj tiam venas malgranda ventopuŝo; kaj jen senmoviĝas.

Mi supreniras laŭ la deklivo kaj sentas min sola en la sovaĝejo. Mallumiĝas. Mi rigardas la horloĝon; eble estas pli malfrue ol mi scias. La horloĝo haltis. Estas kvazaŭ mi pro tio ĉi ankoraŭ pli soliĝus; nun mi ne havas eĉ la horloĝon. Kiel kadavro ĝi kuŝas pezante en mia veŝtopoŝo; mi estas la sola batanta koro en ĉi tiu kreskanta nokto.

Ŝtelvenas frosta timo super min. La pensoj timiĝas, disfuĝas, kuniĝemas; drivas, kiel la nuboj tie supre;

disfendiĝas; kolektas sin en malhelaj, blue-pezaj ĥaosaĵoj, kiuj ĵetas profundajn ombrojn malsupren sur mian ardantan cerbon.

Intermite mi ŝoketiĝas pro tio, ke estas tiel kviete. Mi rigardas ĉirkaŭ mi kaj sentas min nesekura.

La lago tie malsupre kuŝas grizbrila kaj peza kiel plumbo. Mi timas, ke la kolimbo blekos sur la insuleto Skolholmen; ĝia krio de fantomo terurigus min nun. Kion mi timas? — Mi ne tute regas min.

La orienta ĉielo nigriĝadas; ĉiuj nuancoj de nigro estas tie: hela blunigro, peza griznigro, ĉerka blunigro, marverdo-blunigro, mi neniam vidis ion tian. Sed el nordokcidento venas kvazaŭ lumaĵo, malagrablega, nenatura lumaĵo; ne estas brilo de suno nek de luno; estas kvazaŭ brulus la ĉielo malantaŭ la nubtavolo.

Sur la arbara fundo staras la flava boac-likeno strangaspekta en tiu ĉi lumo, obtuze palruĝa; estas kvazaŭ vakskandela lumigo super la vizaĝo de mortinto; tiaj koloroj estis en miaj timemaj infanaĝaj sonĝoj, kiam mi sonĝis pri la tago de l' lasta juĝo. Mallongaj, fortaj ventojetoj venas, tremskuas la arbaron, ree ĉesas kaj malaperas; fariĝas preĝejo silente, silente kvazaŭ la arbaro starus tenante la spiron. Mi mem tenas la spiron, haltas, aŭskultas — ĉu estas io? — ĉu estas io venonta? — La flava lumaĵo en nordo ĵetas sian kadavrobriilon super ĉion. La orienta ĉielo nigriĝas, blue nigriĝas.

Iom da pluvo venas falante, malmole, akre; jen ree forestas. Kaj la arbaro staras aŭskultante, kaj mi staras aŭskultante: ĉu io okazos? — kio estas? — Neniu folio moviĝas. Neniu birdo . . .

Abrupta ventĵetego venas; skuegas ĉiujn arbojn; mortas. Mi suprenrigardas en la flavan nordokcidentan ĉielon kaj timiĝas. Mi turnas min. Prefere hejmenvenu. Tio ĉi devas fariĝi vetero, kia neniam antaŭe okazis.

Mi iras tiel rapide, kiel mi povas, sed senbrue, senbrue kvazaŭ mi timus veki iun. Iras atendante, kaj ŝoksaltetas je ĉiu paŝo: jen komencegos; jen venos . . . La aero estas saturita de elektro; mi estas peza kaj varma; mia koro rapide batas kiel en birdido.

Ĉirkaŭ meze de la deklivo mi estas malsupren veninta; tiam tranĉbrilegas el ĉielo kaj tero — abruptakre, fulmakre — maro da fajro, blublava, blublanka, la mondo plena de fajro; mi tie staras blinda kaj konfuzita. La koro renversiĝas supre en mia gorĝo; antaŭ ol mi povas konsciiĝi, la tondro elrompas per klakbruego, skuieganta, alfunda bruego, tiel ke la terglobo kvazaŭ cedus sur sia pivoto. La bruego disvastigas sin for tra ĉiuj ĉieloj, kun rompoj kaj pafoj, en longaj, skuiegaj ruladoj, en abruptaj, krutaj saltegoj, ĉasas radbruante kaj rulskuante antaŭen laŭ la montodorsoj, kun klakado kaj rompado kontraŭ montflankoj kaj montmuroj, kaj rulbruaj eĥoj de rokfruntoj kaj altaj montoj. Tiam fluegas malsupren, torentas, verŝiĝas, muĝas pluvo; la ĉielo faligas sin en abrupta inundo, en sovaĝa, timiga diluvo. Kaj senkatene okazadas ekbrilo ĉe ekbrilo, klako ĉe klako, estas Ragnarok; mi kuras kvazaŭ pro vivo.

Mi eniras, fermante la pordon, kaj ekbruligas lumilon. Iradas maltrankvile tien kaj reen, necerta pri tio,

kie mi prefere estu, se la fulmo frapus tie ĉi. Daŭras longe. Timiga bruego; krakego post krakego, rulado kaj falbruado; la aero estas plena de dioj kaj gigantoj kiuj batalas, kapfrapiĝas per tondrantaj kornoj kaj malmolaj fruntoj, prijetas unu alian per tondraĵoj kaj krevantaj granitontoj.

Mi sidas tremanta en mia haŭto, kiel arbara besto en sia kaverno, sed tamen ĝojas; ĉar tio ĉi estas potenca. Tiele estu; pri la vivo; dio kontraŭ dio, ogro kontraŭ ogro; egale kiu venkos aŭ malvenkos. Kaj frapas kaj draŝas per pluvo, kvazaŭ bonaj diinoj kaj ogrinoj volus sekurigi la mondon kontraŭ ekbrulo . . .

Fine la fulmotondro fortiras sin. Laste mi aŭdas nur kvazaŭ mortantan trotbrueton forege, inter la plej malproksimaj montoj.

Trad.: *Nils Utne*

Verkado kaj moralo

Helge Krog, la norvega dramverkisto kaj ironia, kritikema pensulo diras:

— Ĉiu valora verko havas en la realo moralan kvaliton — kaj per tio moralan signifon, tute sendepende pri kiu temo, pri kiu motivo ĝi okupas sin. Ĉar se ĝi havas definitivan valoron kiel *kreajo*, tio simple dependas de tio, ke ĝi donas esprimon al io nove vidita, nove travivita, malkovrita — kaj el tio sekvas senpere, ke ĝi ankaŭ havas moralan kvaliton. Ĉiu nova observo, nova intenco havas en si moralan kvaliton kaj moralan signifon. — Male: la verkado, kiu nur variigas malnovajn melodiojn kaj la malnovan perceptmanieron, ne estas nur senvalora, sed — laŭ sia efiko — rekte malmorala. Ĝi efikas inertigante kaj stultigante.

El la samtitola libro: *K. S.*

MIA NOVA AŬTO

Mi estis sola en la instruista ĉambro, ĉar ordinare la lektoroj ne venas al la lernejo tiel frue, se ili havas la unuan lecionon libera — kiel mi havas tiun tagon.

Kvankam sola, mi ne povis koncentrigi miajn pensojn pri la problemo, kiun mi devis post duona horo prezenti en prelego por la plej aĝaj liceanoj. La pensoj koncentriĝis ĉirkaŭ unusola afero: la aŭto, kiun mi aĉetis, kaj kiun mi veturigis hejmen post kvin horoj. Mi neniam antaŭe posedis aŭton —

Kiel plej simple montri la diferencon inter Sofoklo kaj Ajŝilo?

La aŭto estas mia! Kaj mi povos tuj, posttagmeze, fari la unuan ekskurson!

Multaj lernantoj jam vidis min en diversaj aŭtoj, dum demonstraĵaj veturoj... Morgaŭ mi povos, se mi deziras, veni en la propra aŭto al la liceo!

Eble, se mi komencos per *Antigone*, montrante, kiel...

Sed miajn pensojn interrompis la alveno de fraŭlino Gro, unu el la instruistinoj pri knabina gimnastiko. Mi tuj vidis, ke ŝi ne bonfartas.

Ŝi fortasis siajn knabinojn meze en la leciono. Ŝi ne povis pli. Ŝi ŝvitis kaj frostotremis, kaj ŝi estis tre pala.

Fraŭlino Gro ekuŝis sur la sofo, dirante, ke ŝi verŝajne ne povos labori plu tiun tagon.

Mi diris, ke ŝi trankvile iru hejmen, kaj mi informos la rektoron.

— Sed ŝi ja ne povas piediri hejmen, ŝi responde diris.

Fraŭlino Gro estas filino de riĉa industriisto, kaj posedas grandegan,

iom luksan aŭton. Ŝi jam havas ĝin dum tri jaroj, kvankam ŝi havas 15 jarojn malpli ol mi — kaj ja ne perlaboras eĉ la duonon de mia honorario...

"Jes, mi havas la aŭton ĉi tie, sed en mia nuna stato mi ne kuraĝas veturi hejmen."

"Nu, tiel! Do mi veturigis vin hejmen."

"Ĉu vi bonvolus? Mi estas tre danka al vi!"

En la luksa aŭto mi veturigis fraŭlinon Gro tra la urbo, al ŝia hejmo. Venante tien, ŝi demandis min, kiel mi nun venos sufiĉe frue por mia lekcio. Mi rigardis la horloĝon, kaj konstatis, ke tio estos tute neebla.

"Prenu mian aŭton", ŝi diris, — kaj tiel okazis, ke mi alvenis al la lernejo en la interleciona paŭzo. Multaj gelernantoj vidis min alveni tute sola en tiu aŭto, kiun ili bone konis. Mi ŝlisis la aŭton, metis la ŝlosilon en poŝon kaj eniris en la ĉefdomon.

Kiam mi venis en la klason, unu el la junuloj diris: "Gratulon pro la aŭto!"

Mi estis demandonta, kiel oni scias pri mia aĉeto de aŭto, kiam li demandis: "Ĉu vi sukcesis aĉeti la aŭton de fraŭlino Gro?" Li demandis tiel naive sincere...

"Do vi vidis min?"

Tio estis mia sola respondo, antaŭ ol mi transiris al Sofoklo kaj *Antigone*.

Sed en la posta leciono, kiam mi devis instrui knabinan klason pri franca literaturo, sonis tuj ĉe mia eniro en la klason unusona laŭta ekkrio: "Gratulon pro la aŭto!" Fervore la

La proza stilo en Esperanto

(Daŭrigo)

Ĝis nun mi plejparte nur teoriumis. Kiuj estas la aluditaj mallertaĵoj kaj kiel oni povas ilin eviti? Laŭ kiu principo oni povas scii, ĉu sia metodo aranĝi en la prozo estas ĝusta? Kiel, pli specife, la sono rilatas al stilo? Por principo, kvankam skize, respondi tiajn demandojn, sed samtempe eviti la longan pritrakton kiun ili meritas sed por kiu mankas la necesa spaco ĉi-okaze, mi volas riski la starigon de unu baza, negativa regulo aŭ, almenaŭ, konsilon: *Stile nekonsilinde estas, post tro mallonga intervalo, la ripeto de la samaj radikoj, afikso, sonkunmetaĵo aŭ, iafoje, eĉ unuopa sono,*

krom por konscie celata efekto. Aranĝado, surbaze de eŭfoniaj postuloj, rezultigas plaĉan, ofte belan stilon; malatento al la sona valoro de vortoj kondukas al nebela, senalloga lingvokaĉo.

Malagrablaj estas frazoj kiel: *Boneco kaj kompatemeco karakterizis lian tutan konduton.* La ripeto de *eco* dolorigas la orelon. Ankaŭ tio estas tute senbezona. Ĉu ne estas io pli plaĉa pri *Boneco kaj kompatemo karakterizis lian tutan konduton?* Kia diferenco, nur pro la preterlaso de malutila afiksa duobligo!

Jen alia ekzemplo (de speco kiu abundas en niaj revuloj kaj libroj):

knabinoj deziris scii pli, sed kvankam ilia fervoro estis danĝere ĉarma, mi trovis prudente tuj transiri al Emile Zola.

Mi amuziĝis pri la okazaĵo, kaj en la paŭzo rakontis la tutan epizodon al la rektoro, kiu same amuziĝis.

— — —
Vespere la rektoro iris al kunveno en la rotaria klubo, kaj sur la ŝtuparo renkontis la direktoron de aŭtomobila firmao, efektive la sama firmao, kiu vendis aŭton al mi. La direktoro ŝerce rimarkigis, ke la rektoro baldaŭ estos la sola el la stabo, kiu piediras.

"Nun ja ankaŭ lektoro Rosbach aĉetis aŭton", li diris aldone.

Sed tiam la rektoro ekridis. Li povis ja pozitive dementi tion.

La direktoro iom nekomprene rigardis sian rotarian kamaradon: kio estas tio?

La rektoro, kiu scias lerte rakonti, ne longe atendigis la direktoron. Li rakontis la epizodon pri la aŭto de fraŭlino Gro.

"Tiel facile ekestas onidiro", li finis.

Sed la direktoro trankvile diris:

"Tamen mi hodiaŭ posttagmeze vendis aŭton al li".

— — —
Tion ĉi mi eksciis la sekvantan matenon, kiam la rektoro, ekvidante min, ekkriis:

"Sed — lektoro Rosbach — vi ja tamen aĉetis aŭton!"

Mi respondis per ununura vorto:

"Tamen —?"

Tio obliĝis kaj eĉ faciligis la aferon. Pli bone estus diri: *Tio igis la aferon (kaj) ebla kaj facila.* Tial, ke en Esperanto la akcento ĉiam troviĝas eĉ la antaŭlasta silabo, la ripetita elemento tro ofte ricevas emfazon, kio havas fatalan efikon sur la stilo. Lingu al tio la neceson ofte reuzi la samajn afiksojn por kunmeti vortojn, kaj vi havas, en iuj kazoj, efektivan problemon.

Ekzemple, kion fari eĉ: *La ĉambro estis mallarĝa kaj malluma?* Tiu duopo de mal-vortoj agacas miajn dentojn. En tia emo de la lingvo produkti malagrablajn ripetitojn oni devas rekoni gravan motivojn por la enkonduko de neologismoj kiel *streta*. Instinkte sentas precipe la poetoj, ke iu ajn mildigo de tiu tendenco en nia lingvo estus pli bona ol resti eĉ la sama barbara nivelo. Alia vojo tamen ekzistas por la originala — se ne ĉiam por la tradukanta — aŭtoro, nome rediri la samon laŭ iu alia maniero, se eble. *La ĉambro ne nur ne estis larĝa sed ankaŭ malluma?* Ifoje oni povas uzi, anstataŭ *mal*, ankaŭ *ne kaj sen*, sed ne ĉiam. Bona alternativo praktika por tiu frazo do povas esti: *La ĉambro estis mallarĝa kaj senluma*, kvankam — laŭ la pedanta vidpunkto — tio temas pri io alia.

Krom la ordinaraj afiksoj troviĝas ankaŭ alia speciala kampo sur kiu la mallertaĵoj estas precipe fortaj kaj oftaj, nome tiu de la korelativoj. Kiu ankoraŭ ne sentis ion sone malagrablan pri frazoj kiel: *Tiuj, kiuj diras tion estas idiotoj?* Tamen niaj verkistoj persistadas kunuzi la buŝtordan vortduopon *tiuj, kiuj*, eĉ kvankam oni povas ilin tre ofte, se ne ĉiam, aŭ anstataŭigi per aliaj rimedoj aŭ uzi pli estetike. Jen diversaj variantoj por eviti tiun bedaŭrindaĵon: *Kiuj diras tion, tiuj estas idiotoj* (per disigo); *Kiuj diras tion estas idiotoj* per ellaso

de samkaza kaj nebezona vorto, kio estas kaj pli belsona kaj pli mallonga); *Tiuj dirantaj tion estas idiotoj* (per participo); *La dirantaj tion estas idiotoj* (iom nekutima sed tute bona formo) kaj *Estas idiotoj kiuj diras tion* (per ioma reverko. Eĉ mi riskus: *Ili, kiuj diras tion, estas idiotoj*, kun *li, kiu* en la singularo, kvankam la tradiciuloj verŝajne volus krucumi min pro tio, menciante pedantajn argumentojn. Efektive precipe la pluralo, en kiu la pronomo povas esti uzata por diverseksaj personoj, eĉ lasta formo ŝajnas al mi solvo tre plaĉa.

Rilate al alia oftege uzata korelativa duopo *ĉiuj, kiuj* mi volas atentigi, ke eblas, krom la donitaj, ankaŭ plua eblo, nome uzi la singularon *ĉiu, kiu*. Ĉi tio estas laŭsignife samefekta kiel la pluralo, krom escepte. *Ĉiuj, tiuj* povas ofte cedi favore al *ĉiuj ĉi*.

Nu, ne necesas tro insisti, menciante, ekzemple, la neceson eviti tro da pluralaj formoj kune kaj seninterrompe, la nedezirindon fini frazojn ĉiam per la sama vortspeco, la malbelecon de multaj kunuzitaj siblaj sonoj, k. t. p., k. t. p., ĉar devas esti jam klare, pri kio temas.

Kvankam oni povas verki tutan libron pri ĉi tiu afero, ĉio tamen resumiĝas per atentigo al la neceso zorgi en la verkado pri la sonefektoj, pli ol estis kutime ĝis nun. Babilado ne estas prozo, stilo ne estas hazardaĵo, kaj bona Esperanto ne konsistas en senpripensaj kunĵetoj de elementoj, eĉ laŭ-Fundamentaj. Plievoluigi la lingvon, laŭ voje tute ne fremda al la spirito de Esperanto ne estus perfido de lia idealo, eĉ se tio signifus iomete modifi iujn Zamenhofajn stilerajn jam fariĝintajn komunajn, ĉar mi ne povas supozi, ke tiu sagaca homo ĉagreniĝus se nur ni efektive donus al Esperanto pli glatan kaj maturan aspekton.

LA HOMO

Nils Kjør (1870—1924) eseisto, kritikisto kaj dramverkisto, majstro de la norvega prozo.

La homo diras al si mem:

Ĉi tio estas la ĝusta, la forta somero. Ĝi faligas pluvon, kiam pluvo estas bezonata, sed ĝi preferas sunbrilon. Ĝi sendas venton al ĉiuj veloj, kaj ĝi havas kapricojn de pensema, spegulanta kvieto senventa. Ĝi igas ĉiujn rikolti, kion ili semis, sed la bienistoj estas severaj juĝantoj, kaj ili neniam tiriĝas al senrezerva aprobo de la vetero. La somero faras sian plejblon, ĝi montras sian plej helan vizaĝon, sed ĝi ankaŭ favoras ĉiun moderan deziron pri ŝanĝoj. Ĝia ĉielo malpezigite rigardetas de malantaŭ la pluvtorentoj, ĝia suno aperas frumate, estas alta kaj en grandioza malrapideco laŭ la vespera deklivo mal-supreniĝas, dum poste molaj rebriloj de ĝia purpuro ondiĝetas trans la fjorda supraĵo.

La homo kuras trans pintoj de glatfrotita roko, klifoj lekitaj de la maro, dikaj langoj de la granitsubstanco, rokolangetoj poluritaj de sablo kaj ŝtonetoj kun fendoj kaj breĉoj kaj rondigitaj sofoteraj varmegaj kiel la benkoj en banejo. Jen kaj tie en fendo bonfartas tufo de la violkolora plumbago, kaj laŭ la marbordrando la abunda jodflava fuko kun la naĝvezikoj ĉe la akvosupraĵo... Ĉirkaŭe la malgrandaj helikoj dense sidas glufiksante sin mem kaj siajn konkojn per la piedoj pro timo pri asterioj; la malgrandaj travideblaj pandaloj snufas per siaj franĝoj en la fukaro, kaj la kraboj faras sian

solecan, oblikvan marŝon super ŝtonoj kaj konkoj...

Ĉe la marbordo banas sin du sejaraj knabinetoj. Unu estas blanka kiel porcelano, la alia tegole bruna pro sunbrilo kaj abunde da freŝa aero. Ŝi staras en akvo ĝis super la genuoj, kaj la malgrandaj kruroj brilas strange mallongigitaj tra la verdklara akvo.

— Mi estas pli fore, ŝi vokas.

— Jes, sed mi estis pli fore, respondas la malgranda porcelanfiguro.

— Ne, ĉar vi estis nur ĉe la ŝtono.

— Jes, sed mi subakvigis min ĝis la kolo.

— Ne, tio ne estas vera.

— Jes, tio estas verega...

— Jes, sed en la urbo mi havas pupon, kiu povas fermi la okulojn, kaj tion vi ne havas.

La argumento superatutas la porcelanknabineton...

La homo padelas en sia kanoto preter la estiĝanta virina logiko. Malforta venteto tremetas ie kaj krispigas la fjordon en larĝa strio inter la glataj sunbrilaj spacoj. Foceno spiregas kaj subakvigas sin denove sen atento pri la ĉirkaŭaĵoj. Transe, sur la alia fjordbordo, staras la sekalo palise supren laŭ la sunplena deklivo, kaj la kamentuba fumo el blanka domo ringiĝas blua kaj tagmanĝpromesa supren laŭ la malantaŭ montodorso.

Estas vasta kaj sovaĝa, lando neĝenita de homoj. Liberaj marbordoj, liberaj arbaroj, silento. Multaj ĉagreniĝas pro nia multa tero neuzita kaj prezentas kiel grandan modelon por ni la malgrandajn legombedajn kampojn, kie ĉiu futo da humo estas devigata ion produkti. Sed homoj,

kiuj premas ĉiujn avantaĝojn el la tero, ricevas nenion donace de ĝi. La originaĵo en ni interligiĝas kun la nekulturita. Estas ĝojige rigardi brasikkapajn kampojn kaj karotajn bedojn, precipe kiam oni mem posedas ilin; tio vekas agrablajn imagojn pri manĝaĵo kaj mono, sed se ĉirkaŭ la kampoj estas neniu larĝa zono de malcedema sovaĝejo, la homoj premiĝas, kaj se ili ne premiĝas plu, ili estas pli sensignifaj kaj pli malriĉaj ol ili devus. Ĉi tie ekster la kulturo, ekster la valorŝarĝituloj, kreskas la neregebla kaj neutila en animo kaj en humo. Ĉi tie posedas ĉiu kaj nenio. Ĉi tie rememoriĝas la forgesita, ĉi tie murmuras nia soleco, ĉi tie bonfartas nia senordeco, ĉi tie nia herbaĉo ne pereas, ĉi tie niaj rampuloj palpebrumas, ĉi tie niaj birdoj nestas, ĉi tie ni streĉas nin en nia propra muska lito, kaj la sunradiaro tra la somera foliaro estas kaprica kaj balanciĝa kiel niaj propraj pensoj . . .

Ĉi tio estas feliĉo.

Ĉar feliĉo, diris Aristoteles, konsistas el la libereco fari nenion aŭ tion, kion oni emas. Kaj la homo vidas nenian malhelpon en la horizonto. Neniujn paŝojn en la ŝtuparo, nenium enirejan sonorilon, nenium fakturportiston, nenium memorandon, nenium nubon. Kaj la fuĝilo estas vola. La kanoto deteriĝas, perfekta kiel cigno. Ĝi ripozas en la movo, ĝi mole kurbigas sian risortan korpon laŭ la rembatoj, kaj la larĝa plato de la padelilo estas palmopiedo. Sube la fundo estas stepo de graciaj malhelverdaj bendoj de zosterroj. La homo ĵetas sin en la akvon kaj subakviĝas kaj naĝas subakve kun malfermitaj okuloj kaj sentas sin kvazaŭ grandan birdon, kiu per la ventro tuŝetas la molajn herbokampojn en sorĉita kaj transa mondo, densa pro sensoneco kaj kun tremeta verdlumo makulita

per mortblankoj reradioj. Malgranda surtiga okulo rigardas lin, nigra ombreto malaperas en la alta herbo, kiuj inertserpentume balanciĝas ĝis ĝi atingas ekvilibron.

Jes, per kio ja povas la homo sin okupi en sia feliĉo! Formiko devojiĝinta aperas sur la klifo. Ĝi evidente havas nenion por fari en tiu regiono. Ĉi tie eĉ ne estas seka pinpinglo, kiun ĝi povus savi hejmen aŭ per kiu spekulacii. Ĝi kuras tien kaj reen kaj vidas absolute nenium taskon, al kiu ĝi povus dediĉi sian diligenton. Estas eble deviga restado ĉe la marbordo pro la sanstato. La homo sentas sin kvazaŭ altan providencon, devas ion fari vizaĝe al tiu senripoza agemo, kaj metas ĝin en malplenan konkon, proponante ŝipvojaĝon. Ĝi ricevas frakasitan eron de arbŝelo kiel nutraĵprovizon, kaj la homo metas la boaton unu tutan metron for de la bordo. Sed la formiko neniel povas sin dediĉi al "far niente". Ĝi malamas la senlaborajn momentojn de la vivo. Ĝi estas besto sen kompreno pri la naturo kaj ĉirkaŭkuras kvazaŭ kapita per senripoza enuo. Ĝi kuregas al la steveno, kiu turnas for de la bordo, kaj senpacience rigardas sur la vastan maron. Ĝi balancas sin reen, laŭ la tranĉile akra apogrelo, kaj ekstaras sur la malantaŭajn piedojn kaj flaras per la nazo, riskante fali en la akvon — eble nerimarkebla venteto sciigas al ĝi, kie estas la tero. Ankoraŭ kelkfoje ĝi febre ĉirkaŭkuras la ŝipon kaj fine post rapida decido ĵetas sin en la ondojn kaj naĝas rekte al la bordo. Veninte sur la sekan teron ĝi deskuas la malsekan malagrablajon kaj rapidegas hejmen sen malantaŭen rigardi, hejmen al la formikejo kaj la faka societo kaj siaj mil malgrandegaj farotaĵoj . . .

Solveturanta blanka nuboj glitis kvazaŭ membrano antaŭ la sunon,

kaj en la areo de la malfortigita lumo la pejzaĝo sammomente paliĝas. La monto fariĝas pli unutone griza. La akvo aspektas pli malvarmeta, la forta bruna fuko ekhavas tuŝon de verdpala malsaneco. La suno naĝas en lakto... rapida ombro pasis la rideton de la tago...

Sed alian tagon la pluvo povas esti densa kaj trudema. La marbordo estas nigraj kaj la arbaro peza pro malsekeco. La fjordo malvigliĝas kaj dormeme ne moviĝas. Spruceto leviĝas de ĉiu guto, kiam ĝi batas la akvosupraĵon, ĝi remalleviĝas en kuveto kaj ringe larĝiĝas, tiel ke la tuta fjordo fariĝas vivanta desegnaĵo de ekscentraj ringoj. Estas fiŝkapta vetero. Estas ia simpatia kompreno inter la merlango kaj kvieta pluvo. Ĝi gajniĝas, manĝegemiĝas kaj fariĝas pli riskema pri sia vivo, kiam ĝi rimarkas la malsekecon super la akvo. Ĝi komencas salti. La sankta Antonio el Padovo provis prediki al la fiŝoj. Tio ne estas necesa. Ili tamen surhokiĝas dum pluvo. La freŝa akvo alkohole efikas sur ilin.

Estas rimarkinde, kiel longe tia solida dorso povas sidi balanciĝetante en boato dum fiŝvetero. Ĝi turnas al la marbordo, kaj la supro de pluvĉapelo eliĝas el ĝia solida senmoveco. Ĝi havas brakon sur la boatrando, kaj kiam la ŝnuro vibras pro vere forta mordo, la brako iomete leviĝas kaj la alia prudente alĵetas manon por helpi ĉe la tirado. Sed la dorso ne partoprenas la movon; ĝi ne vigliĝas pro streĉeco; ĝi unu fojon por ĉiam dediĉis sin al nemovebleco. La homo vokas la dorson kaj demandas, ĉu ĝi kaptis multajn fiŝojn. Sed ĝi ne turnas sian monumentecon; io grumbblas sub la pluvĉapelo, kiu malfermiĝas bedaŭrinde al la kontraŭa direkto.

Kiel la montodorsoj mem! Kiel


jena kvieta Orient-Norvegujo! Ĉie tie neniu supren saltas. Ĉi tie neniu lasas la ŝnuron. Ĉi tie neniu perdas la paciencon, sed ankaŭ ne la insistemon. Ĉi tie estas la longa, neŝancebla volo de la lando.

Bovinaj sonoriloj tintas sur la monteto, kaj la malgaja vespero jam proksimiĝas. La arbaro staras fermita malantaŭ la pluvvolvaĵo, kaj la griza nebuleto duonvoje renkontas la krepuskon.

La homo sidiĝis sur montroketo, malseka ĝis la haŭto, sed ĝi estas neniel pli malseka ol siaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ĝiaj okuloj krepuskas en intimeco kun la ombroj.

Tiel la tago forglitas, tiel la nokto malrapide maturiĝas, kaj la koro de la homo estas silenta kaj nepostulema pro feliĉo...

Trad.: *Johan Hammond Rosbach*



*Infano el Havajo.
(El la verko "Infanoj ne konas limojn".
de S. Waagenaar)*

LIBRO-KULTURO

BILDLIBRO POR NI ĈIUJ



La plej belaj okuloj de Pakistano (apartenantaj al knabino, kiu almozpetis en Karachi). El la fotolibro de S. Waagenaar

Infanoj ne konas limojn (Fotolibro de Sam Waagenaar kun tekstoj de G. Simenon, H. Böll, Ito' Saburo. Eld. A. W. Bruna & Zoon, Utrecht). 111 fotoj kaj artikoloj de la ĵusnotita. Prezo: Sv. k. 4: 80.

La celo de tiu ŝi valora kaj tre bela libro: komprenigi kaj enkorigi al la homoj, ke iusence jam ĉesis la limoj, kiam temas pri infanoj kaj dependas de nia plenkreska generacio, ĉu ni daŭrigos la samajn malicajn stultaĵojn, kiujn ni heredis de niaj malfeliĉaj antaŭuloj. Infanoj estas infanoj ĉie kaj inter ĉiaj cirkonstancoj, ĉu ĝojigaj, ĉu malĝojigaj, la samaj, kaj estis konsekvence de la eldonejo, ke ĝuste tiun ĉi libron ĝi prezentis ankaŭ en Esperanto, kies ĉefa tezo estas la sama instruo. La teksta parto de la libro havas nur 32 paĝojn; ĝi enhavas konvinktonan

antaŭparolon de I. Lapenna. Sam Waagenaar ne estas nur sensacia fotoartisto, sed ankaŭ akrokula observanto, kiu amuze kaj atentige povas direkti niajn pensojn ĝuste al la penso de la natura kaj sava komprenemo. Heinrich Böll, eminenta germana verkisto eksplikas siajn pensojn en alia maniero, ne malpli konvinke kaj finas sian artikolon per la memorindaj vortoj: Radikala kia ĝi estas, la infano metas la gepatrojn antaŭ multampleksan postulon: ĝi deziras ke per sia logiko ili protektu ĝian 'nelogikan' mondon. Ankaŭ la artikolo de G. Simenon temas pri nia respondeco: "En la infano, por kiu ni emas elekti estontecon jam je la naskiĝo, la plenaĝula potencie jam ekzistas". Ito' Saburi diras en sia originala E-artikolo i. a. "La homaro devas doni al la infanoj la plej bonan, kion ĝi posedas!..."

La teksto estas tamen nura enkonduko al la aro de la klasike artaj fotoj, el kiuj ĉi-loke ni prezentas kelkajn specimenojn kun la emfaza alvoko: "Se vi volas senti melodion de feliĉa estonto, aĉetu tiun ĉi belan libron".

F. Szilágyi

Ĉinaj bildlibroj — okulravaj

Karpetoj transsaltis la Drakpordon 32 paĝa kolora bildlibro de Jang Sanzi kaj Ding Jonglin; teksto de Gin-Gin, trad. T. H. Knabino kaj Garolo (Versoj de, Liu Gaŭlin, bildoj de Ĉeng Sifa, trad. de Laŭlum). 38 p. Ambaŭ bildlibroj eldonis Ĉina Esp. Ligo, Pekino.

La unua libreto estas tre originala en ĉiuj rilatoj. Temas pri aventuro de nigra karpeto, kiu — apogite de la solidareco de aliaj karpidoj, faras ion grandiozan, transaltas la drakpordon. La desegnisto estas eksterordinare talenta, eble adepto de Disney, sed tamen tute alispeca. La libreto donas multe da plezuro al infanoj same kiel al plenaĝuloj.

Knabino kaj Garolo estas fabelo pri malriĉa knabino kaj ŝia garolo, pri riĉulo, kiu forprenas la birdon por sia filino, kaj pri la multescia garolo, kiu beligas la malriĉan knabinon, kaj turnas la sorton de la popolo.

La rakonton karakterizas tre bonaj versoj kaj vere bela bildomaterialo kun delikataj pastelevaj koloroj, kiuj akriĝas nur en la plej "klasbatala" parto de la rakonto.

F. S.

Moderna Ezopo

Stefo Urban: Nova Ezopo (Orig. poema-ro). Eld. Stafeto, Beletraj Kajeroj 9. 128 p. Kun ilustraĵoj de Jaromir Skrivanek. Prezo: Sv. k. 5: 75.

Stefo Urban, kiu estas muzikisto, komponisto kaj talenta prozverkisto, surmetis la ezopan fablomaskon kaj donas saĝajn lekcionojn pri ĉio kio okazas en la besta homomondo. La libro abundas de mallongaj, koncizaj kaj amuze ironiaj fabletoj. La koncizeco estas unu el la plej regantaj kvalitoj de la bela libro, kaj tio kaptas la leganton, ĉar oni ricevas freŝajn, amuzajn kaj ridetigajn rimarkojn kaj instruojn en la plej konvena epigrama formo. Tipa ekzemplo:

<i>Rano diris al alaŭdo:</i>	<i>Ĝi respondis:</i>
<i>Ci nur kantas por aplaŭdo!</i>	<i>Mia loto! Ci plaŭdiĝu en la koto!</i>

Komprenoble la koncizo — je la favoro de la verkisto ni diru, tre malofte — povas signifi danĝeron de sintrudo kaj povas ŝarĝi ĝuste la konton de la facila komprenobleco; Ke mi citu ankaŭ tian trudkoncizan poemon, mi nur menciu la titolon de "La poŝtuko", kies vortordon oni devas unue rektigi kaj poste oni rimarkas, ke la du strofoj dependas unu de la alia, sed mankas ia "ĉar", kiu ne kuras en nian carbon je la unua penso kaj la vorto "implikon" ne klarigas sin. (Jen la tuta poĉmeto: *De l' poŝtuko — neĝoblanka — la deĵoro — estas danko. — Buboĵ faras — nur implikon: — nazon viŝas — en manikono!*) Nu, ni ripetu, tio estas la escepto, la regulo estas la plentrafo kaj pensigo pri la vivo, kies trezorserĉanta migranto kun ŝercaj kantoj sur la lipo Stefo Urban estas. Lia spegulo, kiu lumas el tiuj ĉi grilkantoj estas grave pli profunda ol tiu, kiun li karakterizas per la jenaj strofoj: *Spegulo montras — nur eksteron — kaj prisilentas — karakteron; — ĉar ofte iĝus — abomene, — se montrus ĝi eĉ — kio ene!*

Ĉu ne klasika ekzemplo de la frapa kaj klara, plezura koncizo?

Lertaj ilustraĵoj ornamas kaj akompanas la agrablajn kaj certe grandparte citotajn epigramojn.

P. Thorsen enkondukis kun simpatiaj vortoj la libron.

F. Szilágyi

Mi abonos por vi Hungaran Vivon kontraŭ malnovaj esperantaj libroj. Skribu: al Ladislav Somlai, Budapeŝt, V. Bajcsy Zsilinszky ut 40.

Pri Ĉeĥoslovakio

Juĝu mem! Faktoj pri Ĉeĥoslovakio (Dua eldono, reverkita, trad. Miloš Lukaš. Eld. Orbis, Prago, 1961).

La detala, ilustrita kaj per geografia karto kompletigita orientigilo pri la ĉeĥoslovakia vivo kaj evoluo, aperis en nova eldono kaj ĝia lerta kaj utila aranĝo donas grandan helpon al ĉiu, kiu iurilate bezonas informojn pri Ĉeĥoslovakio.

Balo, Barono nuda sub sofo —

fariĝis el la frazo "Fruas abono, duoblas bono" per la lerta transforma arto de s-ino Roma Thorsen, Dyblandsvängen 7, Kopenhago BRH. (Enigmokonkurso en 4—5, 1961).

La solvo de la enigmo en 1/1962: *Nun aŭdu, vidu, dum dubo*, donas libropremion al W. v. Waldovski, *Birkenwerder bei Berlin*, Fontanenweg 40, DDR.

Nova tasko: faru kolekton el vortoj Esp., kiuj finiĝas per — lo. Kies solvo donos la plej grandan nombron de tiaj vortoj, havos premion. Limtempo: 15/6, 1962.

Por helpi disvastigi nian lingvon, sendu infandesgnaĵojn al la peranto de MIGRANTA EKSPozICIO-Sro. J. MONTFORT — Apartado 19.003 — Barcelona (Hispanujo).

D-ro Tadros Megalli

festos sian 50-jaran naskiĝtagon la 28-an de aprilo, 1962. D-ro Megalli estis gvidanto de la egipta movado. En 1949 li forlasis sian patrujon por prelegi kaj informi pri Esp. Gratulon! Lia adreso nuna: Münsing am Starenberger See (Germanujo).

En la plej centra parto de Vieno

vi povas trovi komfortan ĉambron (kun matenmanĝo) ĉe esp. paro. 3—5 minutoj de la Urba Parko. Skribu al E. Jaüernig, III. Reiserstr. 10. Wien.

25-jara kuracisto dez. kor. ĉiuteme, interŝanĝi bkart., pm. E-revuojn, librojn. Valentin Al. Melniĉuk, ul. Pobjedy N. 36. HOLOBY. Kovelski r-n, Volynskaja obl. USSR.

Pro la kliŝoj dispointaj

de la antaŭa n-ro (pri Oskar Just) ni kore dankas al *Leutelt-Gesellschaft* a. V. Schw. Gmünd (el la libro: *Künstler des Isergebirges*), kaj pro la sama motivo (t. e. kliŝoprunto por la nuna n-ro) ni diras varman dankon al Landslaget Aktuelli Kunst, Oslo. (Bildoj sur la titolpaĝo kaj al la "Norvega grafiko".

UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

Bilaga medföljer

En la norvega

numero de NORDA PRISMO ni menciuj kaj rekomendu librojn de la NORVEGA LITERATURO de ELDON-EJO ESPERANTO (Boks 942. Oslo) (kaj originalajn de norvegaj aŭtoroj):

C. Støp-Bowitz-Isbrucker: "La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato".

J. H. Rosbach: "Bagatelaro"
"Homoj kaj riveroj" (Koko-eldono)

Nils Christian: "La Fingro de la Diablo"
orig. rakonto
kaj fine ni menciuj la klasikan

Ibsen: Peer Gynt (trad. E. A. Haugen).

Pri la Sūahita lingvo (Swahiti)

deziras korespondi T. Nordlöf, Norrbyv. 8, Huddinge, (Svedl.) kun personoj, kiuj scias tiun lingvon.

Grava kvinlingva libro!

Esperanto en Komerco!

105 p. bele broŝurita, kun antaŭparolo de din. Wensing (Philips Eindhoven).

80 raportoj de firmaoj el la tuta mondo, pri uzo de Esp. en iliaj komercaj rilatoj, Kolektitaj de Bruno Vogelmann.


Eldono Esp.-Rondo-Craillshheim-Germanio. Prezo: gm. 1: 50 plus afr.

Mendebla ankaŭ ĉe *Esperanto-Skolan*, Barnhusg. 8, Stockholm.

F-ino Etilma Gonzales Crus, 22-jara, popollerneja intruistino, deziras korespondi kun ge-esperatistoj. Adreso: *Grecia (Alajuela)*. Costa Rica.

Ni invitas

eksterlandajn esp-istojn senpage pasigi 1—2 tagojn en esp-isto rondo. Sola kondiĉo: kontribuo en programo dum klubkunveno. Kontakto la klubon por pluaj informoj: Esperanta Klubo en HUSKVARNA, Ivar Landén, Gesällg. 8 A, Huskvarna (Svedl.)



MALNOVAJ JARFOLIOJ DE NORDA PRISMO

Taŭga donaco al orienta amiko 1958-1961 por 7.— sv. k. po unu jarfolio. (1.50 Us. Dol., 18 int. resp. kup.)

Odense vokas!

Geografia semajno okazos kun bonega programo antaŭ la kopenhaga kongreso en Odense 28/7—4/8. (Husmandskolen). Informas: P. Thorsen, Dyblandsv. 7, Kopenhago, BRH.

Helsingör

loko de antaŭkongreso 29.7.—4.8. kun feriaj kursoj, prelegoj, ktp. La Internacia Altlernejo estas la antaŭkongresejo. Informas: L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Esperanto Grupo de Metiista Kooperativo

Budapest IV, Rezi Karoly U. 58 petas: bv. sendi esp. gazetojn, afiŝojn, librojn, bildojn kaj fotojn.

Ĉiun donacon ni reaprokos samvalore. Ekz.: esp. tekston havantor "Diafilmon" pri Budapest, jarkolekton de Hungara Vivo.

Esperanto Grupo de la Elektra, Maŝino kaj Kablofabriko

deziras koresp. Resp. garantiata. Budapest, X., Gyömrői ut 128. Hungarlando.



Roald Amundsen